

V-18679 / 1968

Esperanto

det.

JARLIBRO

1968

**D U A
P A R T O**

**UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO**

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)



INVITO AL HELSINKI

"La Blanka Urbo", "Filino de la Balta Maro"..., nomu ĝin kiel vi volas, Helsinko estas ĝuste tiu loko, kiu, ĉirkaŭita de maro, insuloj, arbaroj, vekas la poeziajn sentojn de multaj el sia vizitantoj.

Kun ĝojo la finnaj esperantistoj metas nun je via dispono sian ĉefurbon, por ke vi, kiel miloj da aliaj vizitantoj, povu ĝui la pacan atmosferon, kiu superregas ĝin.

Akceptu la koran kaj varman inviton de la finnaj esperantistoj!

Partoprenu en la

54-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

(27 Julio — 2 Aŭgusto 1969)

Detaloj kaj aliĝiloj riceveblaj ĉe la Landaj Asocioj kaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando.

JARLIBRO

de

Universala Esperanto-Asocio

1968

DUA PARTO

La enhavo de ĉi tiu Jarlibro ne povas esti represita ĉu tute, ĉu parte, sen la permeso de U.E.A.

NUR POR UZO DE MEMBROJ

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2,
Nederlando

ANTAŬPAROLO

Laŭ la kutimo de la lastaj jaroj, la Dua Parto de la Jarlibro aperas jam antaŭ la Universala Kongreso, por tiel ŝpari apartan presigon de la Estrara Raporto por la kongresanoj. Ĉar nur dum la Kongreso mem la raportoj povos esti aprobitaj de la Komitato, povos esti faritaj ankoraŭ iuj ŝanĝoj. Ili aperos poste sur la finaj paĝoj de Jarlibro Unua Parto 1969, sur folio engluota en la eldonaĵon kiun vi nun havas en la manoj. (Ni atentigas, ke sur paĝo 511 de Jarlibro I 1968 oni trovas la folion engluotan en Jarlibron II 1967).

La raportaro prezentita en tiu ĉi Jarlibro klare montras la multflankajn aktivecojn de la Asocio kaj, sekve de tio, la malfacilan financan situacion, kiu malebligas plenan disvolvon de ĉiuj agadoj. Ĉar por organizaĵo kia estas UEA tiu problemo neniam estas definitive solvebla nur pere de kotizaltigoj kaj ŝparoj, la Estraro akceptis en sia lasta kunsido proponon faritan de subskribinto, por la kreo de aparta laborkapitalo, en kiu povos partopreni ĉiu membro aŭ instanco de UEA, kiu havas je dispono por investi sumon de 1.000,— gld. (4.000 steloj).

La plano estas farita speciale okaze de la nuna jubilea jaro de UEA, dum kiu la Asocio ja ekzistas 60 jarojn. Certe, la fondo de tia laborkapitalo por solidigi la bazon de UEA estas plej bela kaj sencoplena maniero por honorigi la fondinton de UEA, Hector Hodler, kiu mem siatempe lasis al la Asocio la legendecan kapitalon Hodler. Estas la ideo, la novan kapitalon tial nomi "Kapitalo Hodler 68". Ĉiu helpu por kreskigi kaj florigi tiun kapitalon, kiu estos plej zorge kaj fruktodone administrata, tiel ke ĝiaj rentumoj povos siavice kreskigi kaj florigi UEA. Ni varme esperas ke la ideo vekos fortan eĥon. Detaloj pri realigo de la plano estas publikigataj en la revuo Esperanto aŭ riceveblaj de la Centra Oficejo.

Plue, en la revuo Esperanto oni jam povis legi ke baldaŭ mi retiriĝos el mia funkcio por transdoni ĝin al la nuna vic-direktoro, d-ro Sadler, dum mi mem fariĝos Komisiito por Specialaj Taskoj. Unu el tiuj taskoj estos la administrado de la nova kapitalo. Sekve, per tiu ĉi Antaŭparolo mi adiaŭas kiel direktorino nian individuan membraron kaj petas, ke la saman fidon ĝi donu al la nova funkciulo.

M. H. Vermaas, Direktorino C.O.

1968

JARO DE HOMAJ RAJTOJ

POR
LA INTERNACIA LINGVO

•
KONTRAŬ
LINGVA DISKRIMINACIO

Rezolucio

IV. 1.4.422 La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favora al Esperanto;

IV. 1.4.421 Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;

IV. 1.4.422 Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de U.N.E.S.C.O.;

IV. 1.4.423 Notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;

IV. 1.4.424 Komisias la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.

El: Rezolucioj de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, Montevideo, 1954.

Universala Esperanto-Asocio

(fondita 1908)

Prezidanto: Prof. D-ro Ivo Lapenna
Generala Sekretario: Günther Becker

KOMITATO:

Albault, D-ro A., 32 Avenue Et. Billières, 31-**Toulouse 03**
Francujo. Tel. 42 08 71.

Allan, J. T., 12 Lonsdale Crescent, **Wellington**, E.3. Nov-
Zelando. Tel: 73-679.

Anjer, L., Boks 7, **Oslo-Nordstrandhögda**, Norvegujo. Tel.
(02) 28 32 59.

Azzi, D-ro Inĝ. Giordano, Viale Giulio Cesare 20, **Como**,
Italujo. Tel. (031) 271259.

Bácskai, D-ro Stefano, Árpád Fejedelem-utca 28/a, **Buda-
pest XVII/Rákoshegy**, Hungarujo. Tel. 131-220/2.

Bakker, Inĝ. Hans, Kastelenstraat 231-II, **Amsterdam-Z**,
Nederlando. Tel. (020) 42 18 53.

Becker, Günther, Alter Hangarten 4, 6653 **Blieskastel**,
Germanujo. Tel.: (06842) 2406.

Berceli, Bela, Gyopár u. 10, **Budapest XI**, Hungarujo.

Bormann, D-ro Werner, Schärstr. 26, 205 **Hamburg 80**,
Germanujo. Tel. 7384508.

Carlén, Erik, Yxhult, S-690 60 **Hällabrottet**, Svedujo. Tel.
019-78013.

Corral, Angel M., A. Margariños Cervantes 2650, **Buenos-
Aires**, Argentino. Tel. 59-6339.

Cseszko, Jenó, Károly u. 7., Mátyásföld, **Budapest XVII**,
Hungarujo.

Dahl, Einar, Box 900, **Uddevalla**, Svedujo. Tel. 1 14 99.

Dér, Lajos, Munkácsy u. 34, **Budapest VI**, Hungarujo.

Domingues, D-ro Carlos, Rua Alvaro Alvim 27, ap. 61,
Rio de Janeiro, Brazilo. Tel. 32-9560.

Egami, Prof. F., Nukui-Minamimati 3-533, Koganei-si,
Tokio, Japanujo.

Gorov, Hristo, San Stefano 23, **Sofio**, Bulgarujo.

Grattapaglia, Giuseppe, Via Onorato Vigliani 15/10, I-10135
Torino, Italujo. Tel. 89 46 93.

Grigorov, A., bulv. Tolbuhin 10, **Sofia**, Bulgarujo.

Grum, J., Str. Brazylijska 3a, m 39, **Warszawa**, Pollando.

Guillaume, Jean, 8 Rue Camille Saulnier, **Le Vésinet**
(S. & O.), Francujo.

Helmuth, Francis E., La Jolla Rancho Rd 801, **La Jolla**,
Calif. Usono. Tel. 454-6959.

Holmes, Harry W., O.B.E., 38 Fillebrook Rd, **London E.11**,
Britujo. Tel. LEY 2240.

Isiguro, Teruhiko, Sugamo 7 — 1662, Tosima-ku, **Tokio**,
Japanujo.

Jaumotte, Maurice, 44 de Bruynlaan, **Wilrijk-Antwerpen**,
Belgujo. Tel. (03) 27 45 25.

Kaloumenos, Ioanis, Atlantos 28, Paleon Faliron, **Athinai**,
Greklando.

Kervers-van Tholen, S-ino E., v. Slingelandtstraat 22, **Den
Haag**, Nederlando. Tel. (070) 54 21 86.

Kohen-Cedek, J., 41 Keren-Kajemmet-str., **Jerusalem**,
Israelo.

Kosieniak, Lech, ul. Piękna 16 b.q, **Warszawa**, Pollando.

Kraus, D-ro L., 27 Marta 5/V. st 24, **Beograd**, Jugoslavio.

Kühlmann, G., Løvetandsvej 31, DK 2700 **Brønshøj**, Dan-
lando. Tel. (01) 60 07 02.

Lakov, Atanas, bul. Tolbuhin 55, **Sofio**, Bulgarujo.

Lapenna, S-ino Emilija, Nova Ves 32, **Zagreb**, Jugoslavio.
Tel. 23-9-88.

Lapenna, Prof. D-ro Ivo, 77 Grasmere Av., **Wembley**,
Mddx., Britujo. Tel. (01) 904 9081.

Lins, Ulrich, Gemarkenstr. 146, 5 **Köln-Dellbrück**, Germa-
nujo. Tel. 221-681095.

Linton, Kenneth G., 11 Poplar Str., **South Caulfield**, Vic.
3162, Aŭstralio. Tel. 53-16 78.

Maertens, G., Pr. Leopoldstraat 51, **Sint Kruis**, Belgujo.
Tel. (050) 3 49 35.

Markarian, Raif, 2 Hazel Grove, Hartwood Park, **Chorley**,
Lancs., Britujo. Tel. 45 72.

Minnaja, D-ro C., Via Palermo 26, I-35100 **Padova**, Italujo.
Tel. 44082.

OhUiginn, Lorcán, Esperanto Services, 85 Sparks St.,
Ottawa 4, Ont., Kanado.

Osibov, Ivo, Splitskog odreda 15, **Split**, Jugoslavio.

Pádua, Geraldo, Rua Rio de Janeiro 1599, **Belo Horizonte**
(Minas Gerais), Brazilo.

Pancer, Prof. D-ro Oton, Voćarsko naselje 10, **Zagreb**,
Jugoslavio.

Parker, F., 368 Colne Road, **Burnley**, Lancs., Britujo.

Pickel, Ludwig, Poŝtkesto 2113, 85 **Nürnberg 2**, Germanujo.
Tel. 55 62 69; 44 36 49.

Popović, Prof. B., Tehnički fakultet, **Niš**, Jugoslavio.

Radvánszky, F-ino Emilia, Damjanich u. 21, **Budapest**
XVII. (Rákoshegy), Hungarujo.

Régulo Pérez, D-ro J., Apartado 25, **La Laguna**, Tenerife,
Kan. Insuloj. Tel. 25 93 08.

Rentmeister, F. W., Kauergasse 1/I, St. 2 Stg. 15, **Wien**
XV/101, A. 1150, Aŭstrujo.

Röll, D-ro Ludwig, Friedrich-von-Teck-Str. 3, 8884, **Höchst-**
stadt, Germanujo. Tel. 217.

Rousseau, Jack, 64 Avenue Jean Moulin, F-75-**Paris 14**,
Francujo, tel. 842-54-54.

Sancho Izquierdo, Miguel, Torre Nueva 30, **Zaragoza**,
Hispanujo. Tel. 22 30 77.

Schulze, William, 410 Darrell Rd., **Hillsborough**, Calif.,
Usono. Tel. DI 2-1796.

Simeonov, Inĝ. S. D., ul. Gav. Genov 22, **Sofia C**, Bul-
garujo. Tel. 7 47 16.

Söderberg, Karl, Luthagesplanaden 15a, **Uppsala**, Svedujo.
Tel. 3 68 43.

Søgaard-Hansen, Leo, Uffesvej 17, DK 8000 **Aarhus C**,
Danlando. Tel. (06) 14 33 94.

Støp-Bowitz, C., Camilla Colletts vei 3, **Oslo 2**, Norvegujo.
Tel. 44 80 85.

Strönne, Jan, Amiralsgatan 36, **Malmö**, Svedujo. Tel. 29211.

Sturzenegger, J. J., Rothstrasse 7, 8057 **Zürich**, Svislando.
Tel. (051) 28 53 47.

Thierry, Jean, 5 rue Léon Cogniet, **Paris 17**, Francujo.
Tel. Carnot 89.16.

Toczyski, Józef, skr.p. 57, **Gdańsk**, Pollando.

Tonkin, D-ro H. R., 2131 Tryon Street, **Philadelphia**, Pa.
19146, Usono.

Tričkov, Radoslav, Tolbuĥin 63, **Vraca**, Bulgarujo. Tel.
11 59.

Uśpieński, J., Str. Broniwoja 6 m. 30, **Warszawa 12**, Pol-
lando. Tel. 31 52 47.

Vincent, S-ino J., Rue des Oiseaux, F-27-**Les Andelys**
(Eure), Francujo. Tel. 474.

Wells, J. C., 33 Rye Hill Park, **London S. E. 15**, Britujo.
Tel. (01) 639 6315.

Wensing, E. L. M., Postbus 412, **Eindhoven**, Nederlando.
Tel. (04900) 1 08 28.

Woessink, E. J., Vondellaan 47, **Arnhem**, Nederlando. Tel.
(08300) 2 12 56; (Oficejo) 3 50 31.

Zlatnar, D-ro P., Rimska c 7/II, **Ljubljana**, Jugoslavio.
Tel. 2 03 60.

Observantoj:

Derks, J. J., Boulevard d'Italie 8, **Monte Carlo**, Monako.
Tel. 30 80 97.

Raveloson, Eugène, B.P. 1678, **Tananarive**, Madagaskaro.

Tshibala, Alphonse, B.P. 2697, Banque Nationale, **Kinshasa-**
Kalina, Kongo.

Zeballos Morales, D-ro Romulo, **Fray Marcos**, (Florida),
Urugvajo.

LA ESPERANTA FLAGO

La Estraro de UEA decidis rekomendi, ke ĉiuj Esperanto-
flagoj konformiĝu al la jenaj proporcioj:

Longeco: Larĝeco: Latero de la blanka kvadrato = 3 : 2 : 1.

Latero de la blanka kvadrato: Radio de la cirklo ĉirkaŭs-
kribebla ĉirkaŭ la stelo = 10 : 3,5.

Estraro de U.E.A.

Prezidanto:

Prof. D-ro I. Lapenna, estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx., Britujo; tel. (01) 904 9081.

Generala Sekretario:

G. Becker, estrarano pri informado D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 4, Germanujo. Tel.: (06842) 2406.

Vic-prezidantoj:

E. L. M. Wensing, estrarano pri administrado, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando. Tel. (04900) 1 08 28.

E. Carlén, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo. Tel. 019-7 20 70.

Membroj:

M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo. Tel. (03) 274525.
J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando. Tel. (08300) 2 12 56; (oficejo) 3 50 31.

D-ro P. Zlatnar, estrarano pri kongresoj, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio. Tel. 20-360.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA:

U. Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Gemarkenstr. 146, Germanujo.

Direktoro de la Centra Oficejo (ekde 1.8.1968): D-ro V. Sadler.

Konstanta Kongresa Sekretario: G. G. Pompilio, ĉe UEA.

Redaktoro de "Esperanto": D-ro V. Sadler, ĉe UEA.

Redaktoro de "La Praktiko": Wilhelm Schmid, 4537, Kurohama, Hasuda-mati, Saitama-ken, Japanujo.

Redaktoro de "Kontakto": S-ro Roman Dobrzyński, ul. Garwolińska 14 m 64, Warszawa, Pollando.

Honora Patrona Komitato

Prof. D-ro Björn Collinder, emerita profesoro pri finnugraj lingvoj en la Universitato de Uppsala, Svedujo.

Prof. W. E. Collinson, emerita profesoro de la Universitato de Liverpool, Britujo, M.A. de la Universitato de Londono, Dr. phil. de la Universitato de Heidelberg, "Fellow" de la "University College" en Londono, prezidinto de I.S.A.E.

D-ro W. Drees, estinta ministro pri Sociaj Aferoj kaj ĉef-ministro, nun Honor-Ministro en Nederlando.

Herbert L. Elvin, estinta direktoro de la Departemento pri Edukado de UNESKO, nun direktoro de la Instituto pri edukado de la Londona Universitato.

Prof. M. Fréchet, emerita profesoro de la Universitato de Parizo, membro de la Sciencaj Akademioj de Francujo, Pollando kaj Nederlando, prezidinto de I.S.A.E.

Ralph Harry, C.B.E., ambasadoro de Aŭstralio en Sajgono.

Prof. Seiho Nishi, estinta profesoro de la Universitato de Sendaj kaj Tokio, iama rektoro de la Universitato de Gunma, prezidanto de Maebasi Medicina Kolegio, prezidinto de I.S.A.E.

Prof. Miguel Sancho-Izquierdo, honora rektoro de la Universitato de Zaragoza, Hispanujo, membro de la Supera Konsilo de Sciencaj Esploroj.

Prof. D-ro Yrjö Väisälä, emerita membro de la Akademio de Finnlando, direktoro de la astronomi-optika instituto en Turku, prezidanto de ISAE.

Universala Esperanto-Asocio

CENTRA OFICEJO:

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, — Nederlando
Telefona: 23 27 88

Banko: Mees & Hope, Blaak 10 — Rotterdam-1

Banko: Crédit Lyonnais, 19 Bd. des Italiens, Paris-2

Poŝtĉekkonto Nederlando: 378964

Poŝtĉekkonto Svedujo: 74374

Poŝtkonto Svislando: 12-2310

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM

Direktoro (ekde 1.8.1968): D-ro V. Sadler

Komisiito por Specialaj Taskoj: F-ino M. H. Vermaas

Administrado. — Ĉion, kio rilatas al administrado, aliĝoj, kotizoj, abonoj, anoncoj kaj la Jarlibro sendu per la ĉefdelegito aŭ rekte al la Centra Oficejo (= C.O.).

Anoncoj. — Anoncoj kaj reklamoj por la revuoj kaj por la Jarlibro estu sendataj al la C.O. La tarifo por reklamoj en la revuo 'Esperanto' kaj en aliaj periodaĵoj de UEA estas ricevebla kontraŭ peto al la C.O. Por anoncetoj 0,45 gld. aŭ unu respondkuponon por ĉiu duobla vortoj.

La tarifo por reklamoj en la jarlibro 1969 estas 120,— gld. por tuta paĝo, kaj proporcie por duona aŭ kvarona paĝo (pli malgrandajn oni ne akceptas). Tekstoj de reklamoj kun la koncerna pago devas atingi la Centran Oficejon plej malfrue la 1-an de oktobro por la 1-a parto kaj la 1-an de aprilo por la 2-a parto.

Delegitoj. — C.O. prizorgas la administradon kaj la adresaron de la delegitoj.

Jarlibro. — C.O. zorgas pri ĝia eldonado.

Kongresoj. — La jara Universala Kongreso de Esperanto estas organizata sub kontrolo de la C.O.

Libroservo. — Libromendojn oni sendu al la C.O.

Pagoj. — Al la C.O. oni povas pagi per ĉekoj, poŝtmandatoj, UNESKO-kuponoj, steloj aŭ int. respondkuponoj. El ĉiuj sterlingaj landoj oni povas sendi al la C.O. en Nederlando sterlingajn poŝtmandatojn enkasigendajn en Britujo. UEA povos enkasigi ilin.

Gastoj. — La C.O. volonte akceptas vizitantojn por montri al ili la propran domon de la Asocio kaj la funkciadon de la laboroj. Oni venu prefere inter la 13-a kaj 14-a horoj aŭ inter la 17-a kaj 18-a. Oni ne forgesu, ke la geoficistoj ĉiam havas multe da laboro, kaj oni do ne restu pli ol duonan horon, se oni ne havas iun specialan temon por pritrakti. Se iel eble, oni antaŭe anoncu sian venon.

LA MAGNETOFONA SERVO DE UEA

proponas al vi pli ol
230 REGISTRAJOJN !

Ĉeestu perbende la Universalajn Kongresojn....
Aŭskultu famajn parolitojn....
Perfektigu vian prononcon....
Vivigu la klubvesperojn....

Detaloj ek de p. 97

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO

London — Rotterdam

Honorofica direktoro:

Univ. Prof. D-ro Ivo Lapenna, jura konsilisto, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo. Tel. (01) 904 9081.

Kunlaborantoj en multaj landoj.

Celo:

A. Sciencaj esploroj: Lingvistikaj kaj sociologiaj studoj pri la Internacia Lingvo kaj ĝiaj multflankaj aplikoj sur ĉiuj kampoj de la homa aktiveco. Psikologiaj kaj sociologiaj studoj pri la moralaj kaj intelektaj efikoj, kiujn kaŭzas la praktika uzado de la Internacia Lingvo. Esplorado de la eblecoj por plua utiligo de la Internacia Lingvo precipe sur la kampoj de scienco kaj arto, intelektaj interŝanĝoj, trafiko kaj komerco.

B. Dokumentado: Enregistrigo de la plej gravaj dokumentoj koncerne la Internacian Lingvon kaj la Esperanto-organizaĵojn. Ellaborado de statistikoj. Kolektado de studoj kaj disertacioj.

C. Informado: Vasta utiligo de dokumentoj menciitaj sub B por verkado de artikoloj; kunmetado de tipaj prelegoj por diversaj okazoj; pretigado de bazaj flugfolioj, alvokoj kaj broŝuroj; aktiva partoprenado en ĉiuj medioj, kiuj pritraktas la problemon de komuna lingvo; interŝanĝado de informoj kaj dokumentoj kun UNESKO, UN kaj aliaj gravaj internaciaj organizaĵoj: liverado de konvena materialo al la landaj kaj fakaj asocioj.

Raporto pri la agado troviĝos en la Estrara Raporto en la Dua Parto de tiu ĉi Jarlibro.

SERVA CENTRO DE U.E.A.

Administranto: S-ro J. J. Sturzenegger, Rothstrasse 7, 8057 Zürich, Svislando; tel. 051/28-53-47; pk 12-2310.

La medicina scienco ĉiam pli progresas !

La meza aĝo de la homo fariĝas de tago al tago pli alta ! Do,

Kial

VI NE FARIĜU DUMVIVA MEMBRO DE U.E.A. ?

La kotizo estas nur 20-oblo de la kotizo de Membro-Abonanto.

Se vi estas juna, la Dumviva Membreco estos al vi tre profita. Post 20 jaroj senpage vi restos Membro-Abonanto de U.E.A.

Se vi estas jam neĵuna sed sana kaj iom atentos la trafikon, ankoraŭ la Dumviva Membreco estos profita al vi, ĉar eventualajn postajn kotizaltigojn vi ne pagos. Krome — vi helpas la Asocion kaj tio donos moralan kontentiĝon.

Tial

FARIĜU DUMVIVA MEMBRO DE U.E.A. !

Ĉu vi jam estas Dumviva Membro sed deziras plie subteni la Asocion?

Fariĝu DUMVIVA PATRONO !

(20-oblo de la kotizo de Patrono aŭ 200 x Kotizo MA)

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO

London — Rotterdam

Honorofica direktoro:

Univ. Prof. D-ro Ivo Lapenna, jura konsilisto, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo. Tel. (01) 904 9081.

Kunlaborantoj en multaj landoj.

Celo:

A. Sciencaj esploroj: Lingvistikaj kaj sociologiaj studoj pri la Internacia Lingvo kaj ĝiaj multflankaj aplikoj sur ĉiuj kampoj de la homa aktiveco. Psikologiaj kaj sociologiaj studoj pri la moralaj kaj intelektaj efikoj, kiujn kaŭzas la praktika uzado de la Internacia Lingvo. Esplorado de la eblecoj por plua utiligo de la Internacia Lingvo precipe sur la kampoj de scienco kaj arto, intelektaj interŝanĝoj, trafiko kaj komerco.

B. Dokumentado: Enregistrigo de la plej gravaj dokumentoj koncerne la Internacian Lingvon kaj la Esperanto-organizaĵojn. Ellaborado de statistikoj. Kolektado de studoj kaj disertacioj.

C. Informado: Vasta utiligo de dokumentoj menciitaj sub B por verkado de artikoloj; kunmetado de tipaj prelegoj por diversaj okazoj; pretigado de bazaj flugfolioj, alvokoj kaj broŝuroj; aktiva partoprenado en ĉiuj medioj, kiuj pritraktas la problemon de komuna lingvo; interŝanĝado de informoj kaj dokumentoj kun UNESKO, UN kaj aliaj gravaj internaciaj organizaĵoj: liverado de konvena materialo al la landaj kaj fakaj asocioj.

Raporto pri la agado troviĝos en la Estrara Raporto en la Dua Parto de tiu ĉi Jarlibro.

SERVA CENTRO DE U.E.A.

Administranto: S-ro J. J. Sturzenegger, Rothstrasse 7, 8057 Zürich, Svislando; tel. 051/28-53-47; pk 12-2310.

La medicina scienco ĉiam pli progresas !

La meza aĝo de la homo fariĝas de tago al tago pli alta ! Do,

Kial

VI NE FARIĜU DUMVIVA MEMBRO DE U.E.A. ?

La kotizo estas nur 20-oblo de la kotizo de Membro-Abonanto.

Se vi estas juna, la Dumviva Membreco estos al vi tre profita. Post 20 jaroj senpage vi restos Membro-Abonanto de U.E.A.

Se vi estas jam neĵuna sed sana kaj iom atentus la trafikon, ankoraŭ la Dumviva Membreco estos profita al vi, ĉar eventualajn postajn kotizaltigojn vi ne pagos. Krome — vi helpos la Asocion kaj tio donos moralan kontentigon.

Tial

FARIĜU DUMVIVA MEMBRO DE U.E.A. !

Ĉu vi jam estas Dumviva Membro sed deziras plie subteni la Asocion?

Fariĝu DUMVIVA PATRONO !

(20-oblo de la kotizo de Patrono aŭ 200 x Kotizo MA)

U.E.A.-Kotizoj

(Klarigo de la tabelo troviĝanta sur la sekvantaj paĝoj)

Personoj ankoraŭ ne 22-jaraj povas esti

Juna Membro kun Jarlibro (**J-MJ**), kiu pagas 6,25 gld. kaj ricevas la Jarlibron, aŭ

Juna Membro-Abonanto (**J-MA**), kiu pagas 18,75 gld. kaj ricevas la Jarlibron, la monatan revuon "Esperanto", kaj la kvaronjaran junularan gazeton "Kontakto".

Personoj de 22 ĝis inkluzive 25-jaraj povas esti

Membro kun Jarlibro (**MJ**), kiu pagas 12,50 gld. kaj ricevas la Jarlibron, aŭ

Membro-Abonanto kun "Kontakto" (**MA-K**), kiu pagas 25,— gld. kaj ricevas la Jarlibron, la revuon "Esperanto", kaj la junularan gazeton "Kontakto".

Personoj pli ol 25-jaraj povas esti

Membro kun Jarlibro (**MJ**), kiu pagas 12,50 gld. kaj ricevas la Jarlibron, aŭ

Membro-Abonanto (**MA**), kiu pagas 25,— gld. kaj ricevas la Jarlibron kaj la revuon "Esperanto".

Personoj, kiuj volas finance helpi la Asocion, povas fariĝi

Membro-Subtenanto (**MS**), kiu pagas 37,50 gld. kaj ricevas la Jarlibron, la revuon "Esperanto", kaj (se li estas malpli ol 26-jara) la gazeton "Kontakto", aŭ

Patrono (**Pat.**), kiu pagas 250,— gld. (dekoble la kotizon de MA) kaj ricevas la samajn eldonaĵojn, kiel MS.

Dumviva Membro (DM) pagas por la tuta vivo per unu fojo nur 20-oble la kotizon de MA, sendepende de eventualaj postaj kotizaltigoj. Li ricevas la Jarlibron, la revuon "Esperanto" kaj (dum li ankoraŭ estas malpli ol 26-jara) la gazeton "Kontakto". Dumviva Membreco kostas 500,— gld.

Dumviva Patrono (D-Pat.) pagas por la tuta vivo per unu fojo 5000,— gld. (20-oble la kotizon de Patrono), ĉar li deziras tre forte subteni la Asocion. Li ricevas la samajn eldonaĵojn kiel DM.

Ĉiuj membroj, en kiu ajn kategorio, ricevas krom la menciitaj eldonaĵoj ankaŭ membrokarton kaj membro-markfolion (vidu la regularon pri la delegita servo en la unua parto de la Jarlibro).

Ĉiu ankaŭ povas aboni aparte la revuon "Esperanto" (18,75 gld. jare), la junularan gazeton "Kontakto" (8,— gld. jare) kaj la monatan revuon "La Praktiko" (12,— gld. jare). En la tabelo, kiu sekvas, la mallongigo "Ab." signifas abonon al la revuo "Esperanto".

Ĉiuj kotizoj supremenciitaj validas por la kalendara jaro.

Por registrita poŝto, se dezirata, oni aldonu jare 8,25 gld. por la revuo "Esperanto" kaj 1,50 gld. por la Jarlibro.

Oni povas pagi kotizojn kaj abonojn al la pagejoj indikitaj, aŭ al la Centra Oficejo:

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, pere de ĝia poŝtĉekkonto n-ro 37 89 64 aŭ pere de ĝia banko R. Mees & Hope aŭ per la aliaj rimedoj indikitaj sur p. 15.

REKLAMO EN LA JARLIBRO

de U.E.A. kostas 120,— gld. por tuta paĝo, kaj proporcie por duona aŭ kvarona paĝo (pli malgrandajn ni ne akceptas). La kostoj por kovrilaj paĝoj estas duoblaj. Kliŝo-kostoj (liniokliŝo 12,— gld; fotokliŝo 15,— gld.) estas ekstre kalkulataj. Tekstoj de reklamoj kun la koncerna pago devas atingi la Centran Oficejon plej malfrue la 1-an de oktobro por la 1-a parto kaj la 1-an de aprilo por la 2-a parto.

KOTIZOJ

Lando	MJ	MA MA-K	MS	J-MJ	J-MA Ab.	Valuto
Argentino	laŭ nederlanda tarifo					
Aŭstralio	3,25	6,50	9,75	1,60	5,—	aŭs. dol.
Aŭstrujo	90	180	270	45	135	Sch.
Belgujo	170	340	510	85	255	b.fr
Brazilo	laŭ nederlanda tarifo					
Britujo	29/—	58/—	87/—	14/6	43/6	ŝil.
Bulgarujo	laŭ nederlanda tarifo					
Ĉeĥoslovakio	laŭ nederlanda tarifo					
Danlando	27,50	55,—	82,50	13,75	41,25	d.kr.
Finnlando	16,—	32,—	48,—	8,—	24,—	m.k.
Francujo	17,50	35,—	52,50	8,75	26,25	F.
Germanujo	15,—	30,—	45,—	7,50	22,50	g.mk.
Grekujo	100	200	300	50	150	dr
Hindujo	25/—	50/—	75/—	12/50	37/50	rup.
Hispanujo	240	480	720	120	360	pes.
Irlando	laŭ nederlanda tarifo					
Islando	laŭ nederlanda tarifo					
Israelo	laŭ nederlanda tarifo					
Italujo	2250	4500	6750	1125	3375	liroj

PAGU LA KOTIZON AL

Adreso

J. C. Milkuschutz, Sarmiento 3298, Olivos.

K. G. Linton, 11 Poplar St., South Caulfield, Vic. 3162;
tel. 53 16 78 & 67 72 58.

F. W. Rentmeister, Kauergasse 1/I St. 2 Stg. 15, Wien,
A. 1150; pĉk Oesterreichischer Esperantisten Verband,
183,874 Wien.

François Schellekens, Frans Hensstraat 44 c-10-3, Ant-
werpen; pĉk 90.51.25.

Brazila Esperanto-Ligo, Praça da República 54-II, ZC 14,
Rio de Janeiro.

Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Ave., London,
W.11; tel. Park 7821.

Bulgara Esperantista Asocio, Poŝtkesto 66, Sofia.

J. Šustr, Dlouhá 10, Praha I; tel. 6 34 64.

Arne Kolle, Østergade 22, DK 9370 Hals; pĉk 80 06 35; tel.
(08) 14 26 11 Hals 31.

Joel Vilkki, Somero; pĉk Tu 60253; tel. 924-4 50 91.

Unuiĝo Franca por Esperanto, 34 rue de Chabrol, F-75-
Paris 10; pĉk 855-35; tel. PROvence 55-03.

Reinhard Haupenthal, D-6603 Sulzbach 1, Am Bahndamm
12; pĉk Saarbrücken 152 93, aŭ Kreissparkasse Sulzbach
Nr. 203-39 363.

S. Sakellaropoulos, Agias Paraskevis 30, Kato Patissia,
Athine.

Hinda Instituto de Esperanto, P.B. 604, New Delhi-1.

R. Molera, Sta Joaquina de Vedruna 13, Moyá (Barc.);
tel. 171.

J. Addis, Kingston House, Ballinteer, Dublin 14.

Fed. de Islandaj Esperantistoj, Pósthólf 1081, Reykjavík.

J. Ben Alter, P.O.B. 379, Petah Tikva.

Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, Torino; tel. 547 697.

KOTIZOJ

Lando	MJ	MA MA-K	MS	J-MJ	J-MA Ab.	Valuto
Japanujo	laŭ nederlanda tarifo					
Jugoslavio	27,50	55,—	82,50	13,75	45,—	din.
Kanado	3,75	7,50	11,25	1,90	5,60	dol
Madagaskaro	875	1750	2625	450	1315	FMG
Maroko	laŭ nederlanda tarifo					
Meksiko	laŭ nederlanda tarifo					
Nederlando	12,50	25,—	37,50	6,25	18,75	n.gld.
Norvegujo	25,—	50,—	75,—	12,50	37,50	n.kr.
Nov-Zelando	3,25	6,50	9,75	1,60	5,—	NZ dol.
Pollando	laŭ nederlanda tarifo					
Portugalujo	100	200	300	50	150	esk.
Sudafriko	2,50	5,—	7,50	1,25	3,75	rnd.
Svedujo	18,75	37,50	56,25	9,50	28,—	sv.kr.
Svislando	15,—	30,—	45,—	7,50	22,50	sv.fr.
Urugvajo	laŭ nederlanda tarifo					
Usono	3,75	7,50	11,25	1,90	5,60	dol.
Venezuelo	laŭ nederlanda tarifo					
Aliaj landoj	laŭ nederlanda tarifo					

PAGU LA KOTIZON AL

Adreso

Japana Esperanto-Instituto, Hongo 2-2-14, Bunkyô-ku, Tokio.

S-ino E. Lapenna, Nova Ves 32/III, Zagreb.

W. D. B. Hackett, 362 Soudan Ave., Toronto 7, Ont.; tel. HU 8-2811.

Esperantista Asocio de Madagaskaro, B.P. 1292, Tananarive; banko BNCI (01) 87.493 Tananarive.

René Cagnon, 19 rue Pierre Parent, Rabat; pĉk Cagnon 161.98 — Rabat; tel. 23600.

F-ino Alicia Zepeda, Altemirano 75-1, México-4, D.F.

Nederlanda Esperantista Asocio "L.E.E.N.", pĉk 34563; Brederodelaan 36, Santpoort Z.

Alfred Skyberg, Østensjøvn 118a, Oslo-Bryn; pĉk 133.29; tel. 26 03 44.

Nov-Zelanda Esp.-Asocio, P.O. Box 40-181, Upper Hutt.

Pola Esperanto-Asocio, ul. Jasna 6, Varsovio.

J. Antunes, Rua dos Fanqueiros 106, 4 dto., Lisboa; tel. 30434 (hejme).

Colin Beckford, P.O. Box 1227, Cape Town.

Sveda Esperanto-Federacio, Specialkonto, Malmö, pĉk 14 74 29.

K. Greutert, Via Monte Ceneri, CH-6512 Giubiasco; tel. 092-5.48.78.

D-ro R. Zeballos Morales, Fray Marcos (Florida).

D. E. Parrish, 328 West 46 St., Los Angeles, Calif. 90037; tel AD 4-1233.

L. Moulines, Apartado 10739, Caracas; tel. 710.692.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando; pĉk 37 89 64 aŭ banko Mees & Hope; tel. (010) 23 27 88.

Pliajn pageblecojn vidu sur p. 13.

FINANCOJ

KOMPARA TABELO PRI SPEZOJ 1967

Enspezoj	Rezultoj	Buĝeto
Kotizoj AM	12.515,70	
MJ	10.501,71	
MA	111.893,14	
MA-K	2.050,—	
MS	10.433,21	
J-MJ	435,21	
J-MA	3.398,25	
SA	2.548,42	
SA (Kongr)	4.731,24	
Donacoj kaj kontribuoj	650,—	500,—
Specialaj donacoj ĝenerala kaso	7.777,68	
Libroservo	22.947,54	20.000,—
Kongreso	16.778,—	18.000,—
Diversaĵoj	3.948,24	1.500,—
Kompenso de kostoj el diversaj fond.	13.387,64	21.000,—
Malprofito	4.018,05	—,—
	228.014,03	217.000,—
Elspezoj		
Salajroj	87.121,50	90.000,—
Afranko kaj telefono	12.314,17	10.000,—
Presaĵoj kaj materialoj	4.184,74	7.000,—
Riparoj maŝinoj	574,78	750,—
Trinkaĵoj	569,10	750,—
Diversaj adm. elsp.	1.672,18	2.500,—
Domo de UEA	9.027,62	1.600,—
Gazeto	48.384,20	50.000,—
Jarlibro I kaj II	32.033,88	30.000,—
Vojaĝ- kaj restadkostoj		
Oficejaj	1.474,70	2.000,—
KKS	5.278,33	2.500,—
Estraraj	343,76	1.800,—
Subvencio Akademio	999,44	1.000,—
Subvencio TEJO	3.915,64	4.000,—
Diversaĵoj ĝeneralaj	8.327,67	10.000,—
Deprezoj	3.792,32	3.100,—
Unufojaj rezervoj kaj revalorigo	8.000,—	—,—
	228.014,03	217.000,—

BILANCO JE LA 31-a DE DECEMBRO 1967

Aktivoj

Monrimedoj:		
Mees, Rotterdam, regula konto	2.032,33	
Mees, Rotterdam, ŝparkonto	544,78	
Ŝparbanko Rotterdam	7.270,57	
A'dam-R'dam-Banko, ŝparlibreto	494,77	
Coöp. Boerenleenbank, ŝparkonto	14.400,—	
Bankkonto Londono	3.864,12	
Crédit Lyonnais	419,05	
Ŝparbanko Rotterdam (1-jara depono)	40.743,05	
Nederlanda poŝtĉekkonto	6.611,29	
Sveda poŝtĉekkonto	2.704,32	
Svisa poŝtĉekkonto	223,39	
Kaso	10,52	
Steloj	433,25	
Respondkuponoj	310,—	80.061,44
Valorpaperoj		55.623,—
Ricevotaj enspezoj		31.271,72
Antaŭpagitaj elspezoj		26.103,23
Debitoroj		110.064,05
Provizoj		50.373,39
Inventario		10.635,78
Garantiaj sumoj		300,—
Domo de UEA		142.582,78
		507.065,39

Pasivoj

Hipoteko		8.400,—
Antaŭricevitaj enspezoj	28.430,45	
Pagotaj elspezoj	13.931,51	
Kreditoroj	163.400,70	
Ŝparkonto	14.400,—	220.162,66
Eldona Fondaĵo (neg) -	9.089,41	
Fondaĵo Universala Ekspoz.	194,79	
Fondaĵo Oficeja Ilaro	278,71	
Propaganda Konto	18.962,36	
Fondaĵo Filma Servo	23,47	
Internacia Arta Teatro (neg) -	23,53	
Fondaĵo Prof. Canuto	1.548,89	
Fond. Plivastigo de la agado	1.502,73	

Kongresa Konto (neg) -	22.335,02	
Kongresa Rezerva Fondaĵo	3.164,82	
Fondaĵo "Helpe al infanoj"	279,87	
Fondaĵo Azio-Afriko	474,65	- 5.017,67
Konto C.E.D. revuo LMLP		16.044,16
Asocia Kapitalo:		
Garantia Fondaĵo	26.717,59	
Fondaĵo Hodler	2.361,73	
Fondaĵo Domo	99.103,02	
Dumvivaj membroj	91.459,83	
Heredaĵoj ktp.	47.834,07	267.476,24
		<u>507.065,39</u>

STATO DE LA ELDONA FONDAĴO JE 31.12.67

Saldo je 1.1.67		-7.874,64
Gajno je:		
Vagado sub Palmoj	60,54	
Angla Antologio	8,01	
Memorlibro	84,02	
Naŭzo	- 188,57	
Kaŭkazaj Rakontoj	98,43	
Reĝo Lear	261,50	323,93
		<u>- 7.550,71</u>
Kompenso kostoj C.O. 25 % de 323,93	80,98	
Malprofito Praktiko	32,54	
Malprofito Monda Kulturo	1.425,18	1.538,70
Saldo je 31.12.67		<u>- 9.089,41</u>

STATO DE LA PROPAGANDA KONTO JE 31.12.67

Saldo je 1.1.67		21.081,37
Enspezoj:		
Profito Kongreso (Budapest)	6.099,33	
Licencpago	8.049,94	
Krompagoj	1.577,08	15.726,35
		<u>36.807,72</u>

Elspezoj:

IAT	700,—	
Eldono CED/7, angla	1.534,55	
Fondaĵo Canuto	5.000,—	
Madagaskaro (subvencio)	170,38	
Broŝuro Homaj Rajtoj	342,92	
Diversaj elspezoj	393,30	
CED, subvencio	5.704,21	
Parto kostoj C.O.	4.000,—	17.845,36
		<u>18.962,36</u>

Saldo je 31.12.67

BUĜETO 1969

Elspezoj

Salajroj	104.000.—
Oficejaj elspezoj	21.400.—
Domo de UEA	2.600.—
Gazeto	55.000.—
Jarlibro	33.000.—
Vojaĝ- kaj restadkostoj	7.000.—
Subvencioj	5.000.—
Bankkostoj	500.—
Estraraj elspezoj	5.000.—
Premioj	800.—
Ĝeneralaj elspezoj	2.300.—
Deprezo domo	3.500.—
	<u>240.150.—</u>

Enspezoj

Kotizoj	160.000.—
Simplaj abonantoj (kongresanoj)	9.000.—
Donacoj kaj kontribuoj	3.000.—
Libroservo	21.000.—
Kongreso	20.000.—
Rentumo	5.000.—
Dumvivaj membroj	10.000.—
Propaganda Konto	8.000.—
Eldona Fondaĵo	150.—
Servoj faritaj por CED	4.000.—
	<u>240.150.—</u>

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

Konto de la C.O. 1-1 — 31-12 — 1967

	£	ŝ	p	£	ŝ	p
CED entute ricevis de UEA	628-	9-	0			
Donacoj kiujn UEA ricevis por CED				51-	19-	3
Subvenco				576-	9-	9
	628-	9-	0	628-	9-	0

Spezoj de CED por la periodo 1-1 — 31-12-1967

	£	ŝ	p	£	ŝ	p
Donacoj	196-	17-	3			
Subvencio	576-	9-	9			
Negativa saldo				9-	12-	2
Skribmaterialo				12-	17-	3
Poŝtelspezoj				48-	14-	9
Oficejo				156-	0-	0
Salajro de la Sekretariino				450-	0-	0
Aliaj elspezoj				121-	14-	9
	773-	7-	0	798-	18-	11
Negativa saldo				25-	11-	11
	798-	18-	11	798-	18-	11

La 31-an de decembro 1967
Sekretariino: Ljuba Lapenna

Ni kontrolis la librojn kaj ĉiujn necesajn dokumentojn kaj ricevis kontentigajn respondojn al niaj demandoj. Ni sekve atestas, ke ĉi tiu bilanco estas ĝusta.

La 10-an de februaro 1968

Fred Parker
A. Diaz

Noto: Donacoj, ricevitaj en 1967 por la revuo LMLP kaj administrataj en la C.O.: 16.044, 16 gld.

BUĜETPROpono DE CED POR LA JARO 1969

	Enspezoj	Elspezoj
Donacoj	150-0-0	
Subvencio de la Propaganda Konto	650-0-0	
Skribmaterialo		20-0-0
Poŝtelspezoj		50-0-0
Oficejaj elspezoj		160-0-0
Salajro de la sekretariino		450-0-0
Aliaj elspezoj (libroj, abonoj, imposto, asekuro, ŝarĝo en la banko, efektivaj elspezoj de kunlaborantoj)		120-0-0
	800-0-0	800-0-0

Grava atentigo:

La buĝetpropono estas farita surbaze de la kostoj fine de marto 1968. Ĉar en Britujo ĉiuj kostoj altiĝas, inkluzive poŝtelspezojn, imposton, asekuron, ktp., tre verŝajne la elspezoj estos pli altaj ol antaŭvidite. Plue, en la buĝetpropono ne troviĝas la enspezoj kaj elspezoj en ligo kun la eldonado de la revuo "La Monda Lingvo-Problemo", ĉar pri ĝi estos regule farata aparta konto.

BUĜETPROpono REVUO LMLP POR LA JARO 1969

Abonoj	9.900.— gld.
El Konto Revuo LMLP	8.500.— gld.
Presado	14.400.— gld.
Servoj de la C.O.	4.000.— gld.
	18.400.— gld. 18.400.— gld.

51-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Budapest, 30 julio — 6 aŭgusto 1966

BILANCO (laŭ ned. gld.)

Elspezoj	
Unua Bulteno + Aliĝilo	2.042,40
Kongresa Karto	200,45
Dua Bulteno	2.638,80
Kongresa Libro	15.415,75
Diversaj Presaĵoj	1.848,16
Insigno	4.856,71

I.S.U.	1.668,78
Propagando	1.928,69
Gazetara Servo	1.608,26
Inaŭguro	18.225,77
Interkona Vespero	2.975,85
Arta Festivalo	
(Teatraj, Muzikaj kaj aliaj aranĝoj)	27.083,32
Oficiala Balo	3.588,92
Junulara Vespero	1.071,00
Oratora Konkurso	140,00
Belarta Konkurso	450,00
Kongresejo	9.660,74
Kostoj Officejo	1.102,17
Materialoj	3.044,49
Afranko	11.016,51
Veturado	1.458,79
Transportoj	2.272,63
Bank- kaj Ĝirkostoj	137,81
Infana Kongreseto	2.112,41
Krompagoj	11.487,34
Licencpago	53.002,31
Maklero Perantoj	1.936,44
Diversaj elspezoj	6.714,97
Profito	13.554,07
	<hr/>
	203.245,54

Enspezoj

Kotizoj	183.557,65
Adopta Kaso	390,21
Literatura Kaso	115,23
Vendo Glumarkoj	113,20
Loĝiga Servo	4.490,44
Ekskursiva Servo	8.032,45
Antaŭkongreso	2.399,80
Postkongreso	1.961,14
Bankedo	450,—
Diversaj Enspezoj	1.735,42
	<hr/>
	203.245,54

H. A. Anneveldt
Librotentisto

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa Sekretario

RAPORTO DE LA ESTRARO pri la agado de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO dum la jaro 1967/68 *)

I. ENKONDUKO

Konforme al la art. 30 de la Statuto tiu ĉi raporto estas kunmetita de la ĝenerala sekretario kaj aprobita de la Estraro en la kunsido de la 20-a de aprilo 1968. Ĝi rilatas al la agado de la organoj de la Asocio en la periodo de la 1.4.67 - 1.4.68. Estas aldonita ankaŭ la raporto de CED pri kiu ĝia direktoro respondecas al la Komitato. La nova Estraro estis elektita dum la Kongreso en Rotterdam. Ĝi dankis tutkore al D-ro Albault kaj D-ro Tonkin, kiuj forlasis siajn oficojn. En la nova Estraro krom la normalaj funkcioj laŭ la Statuto la laboro estas dividita jene: La prezidanto Prof. D-ro Ivo Lapenna okupiĝas, krom pri la taskoj de prezidanto, ankaŭ pri la direktado de CED, pri la fakoj eksteraj rilatoj, kongresoj kaj kulturaj aferoj. La vicprezidanto s-ro Wensing okupiĝas pri la fako de administrado. La vicprezidanto s-ro Carlén okupiĝas pri la metodoj de informado. La ĝenerala sekretario laboras pri informado kaj organizaj aferoj de KKL. S-ro Woessink okupiĝas pri financoj, S-ro Jaumotte pri landaj asocioj, fakaj organizaĵoj kaj ĉiuj fakaj demandoj inkluzive la delegitan reton de UEA. S-ro Toczyski okupiĝas pri lernejoj kaj prezidas la Konsultan Komisionon pri Lernejoj; D-ro Zlatnar kiel novelektita estrarano laboras pri kongresoj kaj konferencoj, ankaŭ lernejoj.

II. ĜENERALAJĜOJ

(1) **Estraro:** La elektoj 1967 faris nur unu ŝanĝon en la konsisto de la Estraro. Anstataŭ D-ro Albault, kiu devis rezigni pri la estraraneco, eniris la Estraron D-ro Petar Zlatnar, Jugoslavio. S-ro Ulrich Lins anstataŭas D-ro

*) **Nota:** Eventualaj ŝanĝoj aŭ korektoj de tiu ĉi raporto aperos en la Unua Parto de la venontjara Jarlibro.

Humphrey Tonkin. La Printempa Kunsido de la malnova Estraro okazis de la 1-a ĝis la 3-a de aprilo 1967 en la C.O. en Rotterdam. Ne povis ĉeesti D-ro Albault kaj D-ro Tonkin. Dum la 52-a U.K. (Tel Aviv-Rotterdam) la Estraro, same, kunsidis en la C.O. La malnova Estraro kunsidis unufoje, la nova dufoje.

(2) **Komitato:** En la pasinta periodo forpasis printempe 1967 neforgesebla Julio Baghy. Kelkajn semajnojn post la U.K. en Rotterdam kie li ĉeestis, la multjara usona komitatano Ch. E. Peterson mortis. En marto 1968 en du sinsekvaj tagoj, same neatendite, por ĉiam forlasis nin du meritplenaj aktivaj komitatanoj, D-ro W. Herrmann kaj S-ro V. J. Kostiainen. D-ro Herrmann estis ankaŭ estrarano dum multaj jaroj. La Estraro esprimas sian profundan bedaŭron pro tiuj perdoj. En 1967 okazis novaj elektoj de komitatanoj A, B, kaj C. Post la U.K. en Rotterdam la Komitato konsistis el 71 komitatanoj. Troviĝas en la Komitato 4 observantoj.

(3) **Honora Patrona Komitato:** Dum la 52-a U.K. la Komitato nomis kiel Honorajn Patronojn la jenajn personojn: Ralph Harry, C.B.E., ambasadoro de Aŭstralio en Bruselo; Prof. D-ro Miguel Sancho Izquierdo, honora rektoro de la Universitato de Zaragoza, membro de la Supera Konsilo de Sciencaj Esploroj, Hispanujo; Prof. D-ro Yrjö Väisälä, emerita membro de la Akademio de Finnlando, direktoro de la astronomia-optika instituto en Turku, prezidento de ISAE. Per tio la H.P.K. konsistas nun el 9 elstaraj personecoj.

(4) **Honora Membraro:** La Asocio bedaŭrinde perdis kvar malnovajn meritplenajn Honorajn Membrojn: Julio Baghy, J. Chr. Brunet, Ing. J. R. G. Isbrucker kaj R. Rian. La Asocio ĉiam memoros ilin kun granda respekto.

(5) **Landaj kaj Fakaj Asocioj:** La nombro de aliĝintaj landaj asocioj estas 30 kaj de aliĝintaj fakaj asocioj estas 3. Kontraktoj pri kunlaboro estis faritaj kun Internacia Turisma Esperanto-Asocio kaj Universala Invalida Esperanto-Asocio, tiel ke nun estas entute 23 kunlaborantaj fakaj aŭ specialigitaj organizaĵoj.

(6) **T.E.J.O.:** Vidu Ĉap. X.

(7) **Jaro de Internacia Turismo:** Okaze de tiu ĉi jaro estis fondita la Internacia Turisma Esperanto-Asocio kaj ekaperis ĝia organo Internacia Turismo. Ĝia prezidento estas s-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj.

III. ADMINISTRADO

A. CENTRA OFICEJO

(1) **Oficistoj:** En la Centra Oficejo laboras nuntempe dek geoficistoj, el kiuj unu duontage, inkluzive de la direktorino kaj K.K.S.

(2) **Domo, ĉambroj:** La sumoj de po 5000,— gld. por la lastaj du ĉambroj, donacitaj de amikoj de la forpasinta membro Simon Saft kaj de la vidvino de Stefano La Colla, estis ricevitaj en la printempo de 1967. Komence de 1968 estis finkolektita la sumo por la Aŭstralia Ĉambro. Al ĝi kontribuis la tuta membraro de Aŭstralia Esperanto-Asocio. La domo bezonis en 1967 plurajn riparojn kaj plibonigojn kaj troviĝas en tre bona stato.

(3) **Meblaro kaj maŝinoj:** Ne okazis novaj aĉetoj. Ĉio troviĝas en bona stato.

(4) **Membraro:** En la momento de verkado de tiu ĉi raporto la membraro 1967 konsistas el la jenaj nombroj kaj kategorioj: AM 24984; MJ 901; MA 4815; MS 301; DM 713; D-Pat. 1; HM 29; J-MJ 59; J-MA 194; MA-K 160. Entute 32 157 membroj en 79 landoj. El ili 7173 estis individuaj membroj.

(5) **Varba laboro:** En kelkaj landoj la ĉefdelegitoj faras energian varban laboron kun bona rezulto. Ankaŭ la C.O. rekte dissendis revarbajn cirkulerojn kaj specimenajn ekzemplerojn al antaŭaj membroj. Komence de 1968 estis lanĉita nova varbkampanjo okaze de la 60-jara ekzistado de UEA. Pli da agado en landa kaj loka kadroj estas necesa inter la granda nombro da asociaj membroj.

(6) **Delegitoj:** En la fino de 1967 la Asocio havis entute 3472 delegitojn en ĉiuj kategorioj (3475 en 1966). El ili estis 1343 delegitoj, 249 vic-delegitoj, 1902 fakdelegitoj kaj 78 junulardelegitoj. Kvankam la nombroj malmulte diferencas de la antaŭaj jaroj, estas granda ŝanĝado en la konsisto de la delegitaro. Multaj novaj delegitoj enskri-

biĝas, sed multaj aliaj forfalas post kelkaj jaroj, ĉar ili ĉesas pagi la kotizon al UEA. La kondiĉo de dujara membreco ne sufiĉe garantias membrofidelecon ankaŭ estonte.

(7) **Jarlibro:** La unua parto de la jarlibro 1967 aperis fine de aprilo kun 544 paĝoj (antaŭan jaron 576). Pro kaŭzoj de ŝparado kelkaj rubrikoj estis reduktitaj aŭ ellasitaj. Ankaŭ en 1967 la dua parto aperis antaŭ la kongreso, kun 64 paĝoj. Ĝi enhavis kiel kutime la Estraran Raportaron, kvankam tiu ĉi estis ankoraŭ traktota dum la Kongreso. Kelkaj ŝanĝoj, akceptitaj dum la kongreso, aperas en la Jarlibro I 1968 sur aparta paĝo engluota en Jarlibron II 1967.

(8) **Gazeto:** Kiel antaŭe, la revuo "Esperanto" estas redaktata kaj prizorgata en la C.O. de d-ro Sadler. En la kadro de la deciditaj ŝparoj ĉiu dua numero estis pli maldika ol normale. Unuan fojon funkciis la nova aranĝo, ke la kongresanoj-nemembroj individuaj de UEA ricevadas la revuon "Esperanto" kontraŭ parto de la kongresa krom-pago ricevita de tiuj kongresanoj. Jarfine ĉiuj ĉi kongresanoj ricevis cirkuleron kun invito membriĝi al UEA kaj efektive pluraj estis tiamaniere interesitaj kaj membrigitaj. (Vidu ankaŭ ĉap. V B).

(9) **Monda Kulturo:** Sekve de la pasintjara decido ĉesigi tiun eldonon estis necese krediti al la abonantoj la duonon de la pagita abono. Responde al tiurilata cirkulero nombro da abonantoj destinis tiun sumon por alia celo.

(10) **La Praktiko:** Daŭrigis ĝian redaktadon Wilhelm Schmid kiu loĝas en Japanujo. La finaranĝo post la dua presprovaĵo okazas en la C.O. (Vidu ankaŭ ĉap. V. B.)

(11) **Libroservo:** La rezultoj de la Libroservo denove estas tre kontentigaj, kio ŝuldiĝas i.a. al pluraj popularaj eldonaĵoj kiel gramofondiskoj k.s.

(12) **Eldona fakto:** Generale, la unuarangaj literaturaĵoj kiujn ĝi eldonas, komence estas tuj vendataj al la literaturamantoj, sed post tio la vendado pli malpli stagnas. Sen la helpo de gvidantoj de kursoj por progresintoj, kiuj devus enkonduki la studantojn en la Esperanto-literaturon kaj rekomendi al ili la klasikajn valoraĵojn, malfacile tiu situacio ŝanĝiĝos.

(13) **Internaciaj Konkursoj:** Verŝajne pro la okazinta kotizaltiĝo malmultaj landoj atingis 100 % en la konkursoj. En la Unua Konkurso eĉ neniu atingis tiun limon, sekve de kio la premio en tiu konkurso ne estis aljuĝita. En la Dua Konkurso venkis Greklando kun konsiderinda plimulto.

(14) **Biblioteko Hodler:** La Biblioteko plenigas la ĉambrojn Kanado kaj Simon Saft en la Domo de UEA, kie ĝin regule utiligas oficistoj de la Centra Oficejo. Ankaŭ ĉi-jare okazis nombro da stud-vizitoj, precipe ĉirkaŭ la tempo de la 52-a Universala Kongreso en Rotterdam. Daŭras la interŝanĝado de duoblaĵoj kun aliaj bibliotekoj kaj privataj kolektantoj. Komenciĝis ĉi-jare la bindado de aparte gravaj volumoj.

B. SERVA CENTRO

La Serva Centro daŭre troviĝas en Zürich, Svislando, gvidata de s-ro J. J. Sturzenegger. Li raportas pri ricevo de pluraj plej diversenhavaj petoj parte responditaj, parte plusenditaj al la C.O. de UEA por pritrakto.

IV. FINANCOJ

(1) **Ĝeneralaj rimarkoj:** La buĝeto por 1967 antaŭvidis sumon de elspezoj kaj enspezoj je 217.000,— gld. Laŭ la spezkontoj, la enspezoj sumiĝis je 224.000,— gld. kaj la elspezoj je 228.000,— gld., tiel ke do estiĝis malprofito de 4.000,— gld. (Ĉiuj sumoj en tiu ĉi ĉapitro estas rondigitaj je 100,— gld.).

Preskaŭ ĉiuj ordinaraĵoj eroj de la elspezoj kaj enspezoj ne grave flankiĝis de la buĝetitaj sumoj, kun nur tri esceptoj.

a) Estis buĝetitaj 500,— gld. por donacoj. Envenis entute 8.400,— gld., inter ili grandaj donacoj de entute 7.800,— gld.

b. Buĝetitaj estis 8.000,— gld. el la Propaganda Konto. Tiu sumo fine estis nur 4.000,— gld.

c) Estis buĝetitaj 3.000,— gld. "kostoj de la domo". Tiu ero fariĝis 10.300,— gld. pro la fakto, ke la domo devis esti farbita kaj ĝia tegmento riparita.

Inter la debitoroj troviĝas kelkaj dubaj kaj krome estas kelkaj perdoj pro devalutoj. En la provizoj (laŭ aĉetprezoj) troviĝas libroj kaj aliaj eldonaĵoj, kiuj estas malfacile vendeblaj. Aliflanke la domo valoras multe pli ol la antaŭe bilancita sumo. Por tion korekti nun estas faritaj unufojaj rezervo por debitoroj de 20.000,— gld., rezervo por provizoj de 15.000,— gld. kaj revalorigo de la domo per 27.000,— gld. Kiel negativa saldo el tiuj tri eroj restas 8.000,— gld.

Tiuj 8.000,— gld. plus 7.300,— gld. ekster la buĝetaj elspezoj de riparo de la domo, pli malgranda sumo el la Propaganda Konto de 4.000,— gld. kaj pli malgranda sumo pro kostoj de liveroj al DM de 2.700,— gld., minus 7.900,— gld. ekstraj donacoj, 2.400,— gld. de ekstraj rentumoj kaj plia (malneta) profito el la Libroservo de 3.000,— gld. kaŭzas malprofiton de 8.700,— gld. Pro reduktaj de aliaj elspezoj kaj kelkaj aliaj favoraj diferencoj kompare kun la buĝeto, la fina malprofito fariĝis nur 4.000,— gld.

(2) **Kotizoj:** En la sumo por kotizoj troviĝas 7.300,— gld. ricevitaj por abonoj de "Esperanto" inkluzive 4.700,— gld. de krompagoj de kongresanoj, kiuj ne estas individuaj membroj de U.E.A.

(3) **Donacoj:** La donacoj estas regule publikigataj en "Esperanto". Ankoraŭfoje koregan dankon al tiuj, kiuj per siaj donacoj helpas la laboron de la Asocio.

(4) **Rentumoj:** Estis buĝetitaj por rentumoj 1.500,— gld., sed envenis entute, inkluzive diversajn sumetojn, 3.900,— gld.

(5) **Libroservo:** Ĝi vendis en 1967 entute por valoro de 93.000,— gld. (plus ankoraŭ por 1.300,— gld. de propraj eldonoj). Ĝia — malneta — gajno superis la buĝeton per 3.000,— gld.

(6) **Kongreso:** La duona parto de la licencpago en 1967 estis nur 8.100,— gld. La tutaj kostoj pagitaj de la C.O. (inkluzive la salajron kaj vojaĝkostojn de K.K.S.) estis 16.800,— gld. Tial devis kontribui la Kongresa Konto per sumo de 8.700,— gld., pro kio tiu konto fariĝis ankoraŭ pli negativa.

(7) **Dumvivaj Membroj:** La nombro de DM denove kreskis de 667 al 714. La kostoj pro livero de Jarlibro kaj revuo estis buĝetitaj je 12.000,— gld., sed ili efektive estis nur 9.300,— gld. (vidu ankaŭ 18).

(8) **Bilanco:** Komparante la financon situacion de UEA je la fino de la jaroj 1966 kaj 1967, oni povas konstati, ke ĝi pliboniĝis kaj ke la kapitalo de UEA kreskis. Sed pripensante la grandegan taskon, kiun nia Asocio havas, oni ne povas ne veni al la konkludo ke ĝia kapitalo estas nur ege modesta.

(9) **Eldona Fondaĵo:** El ĝi estis ankoraŭ pagita la defcito de "Monda Kulturo" en la unua duono de la jaro 1967, kiu sumiĝis je 1.400,— gld. Tiel la Eldona Fondaĵo fariĝis pli negativa. "La Praktiko" en 1967 ne plu donis malgajnon.

(10) **Propaganda Konto:** Je 1.1.1967 ĝia saldo estis 21.100,— gld. Restis 19.000,— gld. Vidu la detalojn en la konto mem.

(11) **Kongresa Konto:** Ĝi komenciĝis per negativa saldo de 13.600,— gld.; envenis duono de la licencpago 8.100,— gld.; el ĝi estis prenitaj la kostoj pagitaj de la C.O. por la Kongreso je 16.800,— gld. Tiel ĝia negativa saldo fariĝis 22.300,— gld.

(12) **Kongresa Rezerva Fondaĵo:** Ĝi kreskis per 10 % el la profito de la kongreso Budapest kaj fariĝis 3.200,— gld.

(13) **Konto C.E.D. revuo L.M.L.P.:** Tiu konto prezentas la donacojn ricevitajn en 1967 por la eldono de la nova revuo de C.E.D.

(14) **Asocia Kapitalo:** La kapitalo, ĝis fino de la jaro 1966, estis prezentita en kvar kontoj. La Estraro decidis, ekde 1967 fari apartan konton por la kapitalo de la Dumvivaj Membroj, tiel ke nun la kapitalo estas registrita en kvin kontoj. La tuto de tiuj kontoj altiĝis de 192.400,— gld. al 267.500,— gld.

(15) **Garantia kapitalo:** Ĝi estas konto uzata nur en kazo de malfacilaj cirkonstancoj. Ĝi restis en 1967 je 26.700,— gld.

(16) **Fondaĵo Hodler:** Ĝi estis 3.000,— gld.; el ĝi estis pagitaj kostoj de 600,— gld., do restis 2.400,— gld.

(17) **Fondaĵo Domo:** Ĝi komenciĝis en 1967 per 88.000,— gld. Envenis dufoje 5.000,— gld., nome por pagoj de ĉambroj Saft kaj La Colla kaj 1.100,— gld. kiel partopago por la Aŭstralia ĉambro. Ĝi do fariĝis 99.100,— gld. Tiu Fondaĵo estas grava ĉar per ĝia mono UEA ŝparas grandan sumon pro interezoj.

(18) **Dumvivaj membroj (= rezervo pro devigoj):** Tiu konto komenciĝis je 1.1.1967 per saldo de 74.700,— gld. Envenis pro novaj DM nete 20.500,— gld. kaj la kapitalo kreskis pro kurzprofito pro aĉetitaj akcioj por parto de tiu kapitalo je 5.600,— gld. Deprenitaj estis la efektivaj kostoj de 9.300,— gld. pro liveroj de la revuo kaj Jarlibro al la DM. Tiel la saldo fariĝis 91.500,— gld.

(20) **Heredaĵoj ktp.:** Tiu nova kapitala konto komenciĝis per nulo. Envenis heredaĵoj Hyde 21.500,— gld., Laufen 29.900,— gld. kaj Klein 400,— gld., entute 51.800,— gld. El ĝi estis kovrita la deficino de 4.000,— gld. en 1967. Tiel restas 47.800,— gld.

V. PERIODAĴOJ

A. REVUO ESPERANTO

(1) **Redaktoro:** D-ro Victor Sadler.

(2) **Formato kaj aspekto:** Senŝanĝaj.

(3) **Amplekso kaj enhavo:** La jarkolekto 1967 ampleksis 180 internajn paĝojn (24 malpli, ol en 1966) kaj 44 kovrilajn, entute 224. La provizora redukto de la amplekso havis financajn kaŭzojn. En 1967 ĝeneralaj artikoloj okupis 41 paĝojn, artikoloj, raportoj kaj komunikoj pri kongresoj kaj kongreslandoj 29 p., oficialaj informoj kaj artikoletoj pri internaj organizaj aferoj 20 p., recenzoj kaj ricevitaj eldonaĵoj 20 p., junularaj aferoj 13 p., mallongaj novaĵoj 11 p., anoncoj kaj anoncetoj sur internaj paĝoj 11 p., radio 7 p., nekrologoj 7 p., rubriko CED 6 p., Lerneja Bulteno 6 p., leteroj de legantoj 3 p., literaturo kaj arto 2 p. kaj aliaj eroj kune 4 p. Aperis sur internaj paĝoj 88 ilustraĵoj (pasintjare 136). La ĉefa ŝanĝo de enhavo estas la malpliigo de literaturaj kaj artaj eroj, kvankam parte kompensita tion la artikolserio "Enkonduko en la librosocieton de Esperanto".

(4) **Teknika prizorgo:** Respondecas la redaktoro. La revuon presas la firmo Zwagers, Rotterdam.

B. REVUO LA PRAKTIKO

(1) **Redaktoro:** Daŭrigis la redaktadon Wilhelm Schmid. La koresponda adreso estas ĉe la C.O.

(2) **Formato kaj aspekto:** Pro diversaj cirkonstancoj provizore ankoraŭ ne estis farita iu ŝanĝo.

(3) **Amplekso kaj enhavo:** Aperis 11 numeroj de po 16 paĝoj. La paĝoj, po unu en ĉiu numero, je dispono de U.L., ankaŭ ĉijare ne estis utiligitaj de tiu organizaĵo. La porinfana paĝo "La malgranda Praktiko" estis daŭrigata. El la pli grandaj artikoloj aŭ rakontoj 8 havis karakteron de ĝenerala intereso, 13 traktis primovadajn temojn, 19 rilatis al temoj de arto, scienco, literaturo aŭ ĝenerala kulturo, dum 9 donis karakterizaĵojn pri diversaj landoj. En ligo kun la fakto ke la gazeto havas apartan instruan taskon kaj estas multe uzata kiel studmaterialo, la redaktoro celadas doni en ĉiu numero nombron de mallongaj artikoletoj, informoj, anekdotoj kaj ŝercoj. Kontribuojn bonnivelajn el diversaj landoj li ĉiam bonvenigas. Mankas al li ankoraŭ la kunlaboro de lerta ilustranto por diversaj rakontoj.

(4) **Teknika prizorgo:** La revuon daŭre presis la presejo v/h Dekker.

(5) **Administrado:** La konto de la revuo La Praktiko ĉi jare finiĝis praktike sen deficino kaj, ĉar daŭre anoncas sin novaj abonantoj, la antaŭvidoj por 1968 estas sufiĉe bonaj. Por tiu jaro la abonprezo estas fiksita je 12 gld. (48 steloj).

VI. KONGRESOJ

(1) **U.K. Tel Aviv-Rotterdam:** Pro neantaŭviditaj kaj specialaj kaŭzoj la 52-a Universala Kongreso de Esperanto (2-9 Aŭg. 1967) ne povis okazi en Tel Aviv, sed okazis en Rotterdam. Pro tio estis decidite nomi tiun ĉi Kongreson "52-a U.K. Tel Aviv-Rotterdam". Aliĝis al ĝi 1275 personoj el 39 landoj, sed partoprenis ĝin ĉ. 800 personoj. Alta Protektanto estis S-ro Zalman Shazar, ŝtatprezidanto de Israelo. Membroj de la Honora Komitato

estis 11 elstaraj personecoj el publika, kultura kaj scienca kampoj (8 israelaj kaj 3 nederlandaj). Prezidis la Kongreson Prof. D-ro I. Lapenna, Prezidanto de UEA. Prezidanto de LKK en Israelo estis Prof. J. Kohen Cedek. Kiam estis farita la decido pri translokiĝo de la Kongreso al Rotterdam, la kompleta organizo estis transprenita de la Centra Oficejo. Kiel Konstanta Kongresa Sekretario funkciis S-ro G. G. Pompilio.

Malgraŭ la ŝanĝo de la kongresurbo, okazinta en la unuaj tagoj de junio, estis ebleco organizi la Kongreson en kontentiga maniero. Preskaŭ ĉiuj programeroj, fiksitaj por Tel Aviv, povis esti realigitaj en Rotterdam. Dum la U.K. la Komitato de UEA kunsidis kvar fojojn. Okazis tri Laboraj Sekcioj, kies temoj estis resp.: "Esperanto en fakoj kaj profesioj", "Lerneja kaj eksterlerneja instruado de la Internacia Lingvo", "Esperanto por Turismo". Okazis unu Ĝenerala Kunveno de UEA. La Internacia Somera Universitato konsistis el 6 prelegoj. La Rektoro de ISU estis D-ro P. Neergaard.

Kvankam ĝi devis ludi en ne tre taŭgaj cirkonstancoj, IAT akiris la konsenton de la publiko, prezentante i.a. teatraĵojn de Matković, Čopić, Cankar, Sartre kaj Baghy. Tre sukcesa estis ankaŭ la Varia Programo, kun la partopreno de la aktoro N. Rytjkov, de la kantistino R. van Dalsem kaj de la pianistino T. Schoonman. Dum la Kongreso okazis kunvenoj de 22 fakaj asocioj. Krome, pro la esceptaj cirkonstancoj, en la kadro de la Kongreso okazis la 23-a Internacia Junulara Kongreso. La Akademio havis sian kutiman kunvenon.

La Inaŭguron ĉeestis 16 ambasadoroj kaj reprezentantoj de ambasadoj. Dum la Kongreso okazis la kutimaj Interkona Vespero, Balo kaj Bankedo. La Junulara Vespero koincidis kun la oficiala balo de la 23-a IJK. Ĉiuj partoprenantoj estis oficiale akceptitaj de la Urbeŝtaro de Rotterdam. La Esp. Gaz. Servo estis kiel kutime sindone gvidata de S-ro M. Gjivoje. La enlandan Gaz. Servon prizorgis la C.O. Inter la publikaĵoj de la 52a U.K. menciindaj estas la 4-paĝa grandformata Unua Bulteno, la Dua Bulteno kaj la 102-paĝa Kongresa Libro. Detalaj raportoj aperis en la septembra kaj oktobra numeroj de "Esperanto".

(2) **Aranĝoj en ligo kun la 52-a U.K.:** Post la Kongreso okazis tre sukcesa 7-taga ekskurso tra Nederlando kaj samtempe 5-taga restado, kun eblecoj por mallongaj ekskursoj, en konata nederlanda ripozloko.

(3) **U.K. Madrid:** La 53-a U.K. okazos en Madrid de la 3-a ĝis la 10-a de aŭg. 1968. Detalaj raportoj aperos en la septembra kaj oktobra numeroj de "Esperanto".

(4) **U.K. Helsinki:** La 54-a U.K. okazos en Helsinki de la 26-a de jul. ĝis la 2-a de aŭg. 1969.

VII. INFORMADO

(1) **Enkonduko:** La fakto, ke nun du estraranoj okupiĝas pri informado, montras la gravecon, kiu estas atribuita al ĝi. Por ankoraŭ plibonigi la situacion, estis fondita Komisiono pri Informado, al kiu apartenas la Ĝenerala Sekretario de UEA, D-ro Tonkin kiel Ĝenerala Sekretario de TEJO kaj la reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA S-ro Lins. Tio ankaŭ ebligas, ke la informado de UEA kaj la informado de TEJO estu harmoniigitaj.

(2) **Landaj Informaj Fakoj:** La situacio restis preskaŭ la sama. Kelkaj fakoj faras tre bonan laboron, aliaj apenaŭ sekvas la konsilojn ankaŭ ne la petojn rilate la informadon pri la rezultoj.

(3) **Informa Centro de UEA en Parizo:** La Kunveno de la Informaj Fakoj en la 52-a UK diskutis la ideon de Informa Centro de UEA en Parizo, kies celo estus kombini la bonajn profesiajn rilatojn de S-ro Bourdeaux en Parizo kun la informiteco de la Centra Oficejo en Rotterdam. Tiu Informa Centro de UEA laboras ekde la 1-a de januaro 1968 laŭ la sekvanta skemo:

a. S-ro Bourdeaux uzas sur ĉiuj siaj presaĵoj la titolon "Attaché de presse de l' Association Universelle pour l' Espéranto, Rotterdam, et de l' Union Française pour l' Espéranto".

b. D-ro Sadler regule, ĉiusemajne, sendas al S-ro Bourdeaux karbonkopiojn de tiuj tekstoj preparitaj por "Esperanto", kiuj laŭ lia opinio havas informan valoron.

c. En specialaj kazoj de tre gravaj aŭ tuj aktualaj informoj, li telefonas al S-ro Bourdeaux aŭ telegrafas.

ĉ. S-ro Bourdeaux transdonas tuj ĉion gravan al telegrafagentejoj, gravaj gazetoj en Parizo ktp. kaj de tempo al tempo aranĝas akceptojn por ĵurnalistoj. (S-ro André Bourdeaux, 164, rue de Saussure, F-75 Paris 17e, Francujo, Telefonnumeroj: Parizo 622-49-57 (hejme), 874-73-00 poste demandu 47-75 (oficejo).

(4) **Kunlaborantoj:** 222 personoj el 45 landoj estas individuaj Kunlaborantoj de la IF de UEA. Ekde la lasta jaro ekzistas apartaj Respondiloj por individuaj Kunlaborantoj.

(5) **Traduka Servo:** Denove plibonigita registro pere de la menciitaj respondiloj. (Vidu ankaŭ X. (6) f, traduka servo de TEJO).

(6) **Komunikoj de la IF:** Il: atingis numeron 79 per eldono: Nia informado dum la 'Jaro de la Homaj Rajtoj'.

(7) **IGS:** Aperis 9 novaj bultenoj. La afero restas daŭre aktuala malgraŭ la agado de la Informa Centro en Parizo pro pli bonaj ŝancoj de apero de la informoj per la duvoje.

(8) **Angla-franca IGS:** La eldonado kreskis je 5 numeroj al 64. Oni daŭre sendas la informojn al 368 gazetoj (ne plu al agentejoj) en 86 landoj, precipe en Azio kaj Afriko, sed ankaŭ en aliaj landoj sen informo fako.

(9) **Informado pri la Kongreso:** Pro la fakto, ke la Kongreso devus unue okazi en Tel-Aviv en la 80-a jaro de Esperanto kaj la 50-a mortojaro de Zamenhof aperis jam multaj artikoloj tra la mondo. Ĉar eventoj en kunligo kun Israelo estis en la ĝenerala intereso, oni ankaŭ ĉie raportis pri la ŝanĝo de la kongresurbo. En Rotterdam mem okazis tre bona Gazetara Konferenco, entute la Kongresa Gazetara Servo povis tre efike labori. Ĉe la fino de la Kongreso multaj telegrafagentejoj petis la Kongresan Rezolucion. Denove speciala raportisto de la franca gazeto "Le Figaro" favore raportis. Apero de stereofona disko en Esperanto "Jen nia Mondo" helpis ankaŭ por informi pri Esperanto kaj la Kongreso.

(10) **Agado en universitatoj:** Plue daŭris la kunlaboro kun TEJO kaj STELO. Denove okazis ĉiŝoj en Würzburg dum la 11-a Internacia Seminario de GEJ Forumo en la tiea universitato inter profesoroj de ambaŭ flankoj pri la

temo "Esperanto en la universitatojn?" post gastprelego de Prof. Lapenna pri "La nuntempa soveta koncepto pri ŝtato kaj juro". Ambaŭ aranĝoj donis bonajn kaj kuraĝigajn spertojn.

(11) **Informlaboro en kunligo kun la Jaro de Turismo kaj tiu de la Homaj Rajtoj:** La prezentigantaj eblecoj por atentigi pri la lingva problemo en turismo kaj lingva diskriminacio estis daŭre utiligataj. (Vidu ankaŭ raporton de CED B 6 kaj Dok. CED I/VII 6).

(12) **Agado en Azio kaj Afriko:** Ĉiuj agadoj menciitaj en la lastjara raporto daŭris. (Vidu ankaŭ X.1 pri regionaj komisionoj de TEJO).

(13) **Resumaj ciferoj pri informado:** Ĉi tie estas donitaj nur la resumaj ciferoj kaj parenteze troviĝas, por ebligi komparon, la ciferoj de la jaro 1966: laŭ la 47 (36) respondoj de L.A. aŭ kunlaborantoj en 1967 aperis 3821 (4250) artikoloj kaj 9523 (10725) informoj en nacilingvaj gazetoj. Ĉe 1610 (1514) prelegoj pri Esperanto ĉeestis 74 855 (74 291) personoj. Okazis 1519 (1051) nacilingvaj radio- aŭ TV-prelegoj, 176 (151) ekspoziciojn vizitis 394 141 (397 735) personoj. Estis disdonitaj 578 532 (657 843) informiloj.

(14) **Kunveno 1967:** La Kunveno de la Landaj Informaj Fakoj okazis en Rotterdam. Ĝi diskutis pri la plibonigo de la informado kaj la Informa Centro de UEA en Parizo.

(15) **Kunveno 1968:** Ĝi estas antaŭvidita por Madrid.

(16) **Seminario de UEA en Grésillon:** La seminario sub aŭspicioj de UEA en la kadro de la Internaciaj Kulturaj kaj Turismaj Ferioj en Grésillon pri la temo: Modernaj Formoj de Laboro en la Nuntempa Esperanto Movado estas planita inter la 22-a kaj 27-a de julio 1968.

VIII. LERNEJOJ

(1) **Konsulta Komisiono pri Lernejoj:** La konsisto de la Komisiono ne ŝanĝiĝis kompare kun la pasinta jaro (rigardu duan parton de Jarlibro 1967 VIII, 1). En la nova Estraro de UEA kun KKL kunlaboros ankaŭ d-ro Peter Zlatnar, estrarano pri kongresoj. Dum la 52-a UK en Rotterdam dum la II-a Laborkunsido, kiu estis okupiganta pri la instruado de Esperanto oni esprimis la deziron, ke antaŭ

la 53-a en Madrid oni organizu la Trian Konferencon de Lernejoj, en kiuj Esperanto estas Instruata. Tamen post la Kongreso KKL prikonsideris la aktualan situacion en la movado kaj decidis prokrasti la daton de la Konferenco ĝis la jaro 1969 antaŭ la kongreso en Helsinki.

(2) **Lerneja Bulteno:** Dum la jaro 1967 aperis tri numeroj de L.B. (9a en marta, 10a en junio kaj 11a en novembro numeroj de "Esperanto"). La Bultenon redaktas s-ro Toczyski. Krom en la bulteno, la lernejoj kaj instruistaj problemoj estis traktataj ankaŭ en pluraj aliaj artikoloj, ekz.: pri plialtigo de kvalifikoj ĉe E-instruistaro (Toczyski-marto), pri Esperanto en la lernejoj dum la jaro 1965/66 (CED-marto), trarigardo de nuna stato pri instruado de E. (V. Sadler-majo), pri lernantinoj, kiuj fariĝis instruistinoj (oktobro), kaj multaj aliaj informoj, notoj kaj mencioj.

(3) **Fondaĵo Lernejoj:** La Fondaĵo ankaŭ en tiu ĉi jaro ne trovis inter la Esperantistaro bonvolemajn homojn, kiuj volus apogi tiun belan ideon. Speciale en la lerneja jaro 1968/69 ĝi bezonus favoran apogon lige kun la III-a Konferenco.

(4) **Interlerneja Interkonsento:** KKL prilaboris kaj dissendis koncernen cirkuleron en aprilo 1968 al la Landaj Asocioj. Komitatoj el la koncernaj landoj devus interesiĝi pri la afero kaj montri la grandan avantaĝon, kiun por nia laboro donas la aktiveco "Interkonsento", grava ankaŭ por la landa agado, ĉar donas konstantan instigon en la laboro de tiuj lernejoj.

(5) **Oficialigo:** Dum februaro 1968 KKL dissendis specialan cirkuleron kun la demandoj laŭ la sinsekvo aprobita de la II-a Laborsekcio dum la 52-a U.K. en Rotterdam. En la pasintjara raporto KKL plendis pro la malmultaj respondoj al simila demando; ĉi-jare ĝis la 15-a de aprilo la respondoj same ne kontentigas. Entute respondis 18 personoj en 9 landoj. (pasintjare 40 el 20 landoj). La situacio, koncerne la lernejan instruadon de Esperanto, dum la pasinta jaro ne multe ŝanĝiĝis, kvankam oni povas noti konstantan progreson. Tre viglan kaj planitan laboron celantan la oficialigon de Esperanto-instruado de sia lando montras la italaj instruistoj, pere de sia Instru-

ista Sekcio. Pri la projekto de leĝo 1816 la KKL jam raportis pasintjare; la projekto estas akceptita en marto 1968 de la Ĉambro de Deputitoj.

En Pollando la Ministro de Instruado kaj Superaj Lernejoj aperigis en la marta numero 1968 de la ministeria Ofica Leĝjurnalo la dekreton aprobantan projekton de programo por Esperanto-instruado en ĉiuj lernejoj kiel nedevigan instru-objekton.

En Usono (Kalifornio) dum la lasta jaro oni ŝanĝis la leĝon favore al Esperanto. En Jugoslavio en aprilo 1968 oni aranĝis la duan regionan Konferencon por Enkonduko de Esperanto en Lernejojn kun partopreno de 26 reprezentantoj de jenaj landoj: Aŭstrujo, Bulgarujo, Italujo, Jugoslavio, Hungarujo.

(6) **Konkludo:** Sendube Esperanto-instruado kaj penado oficialigi ĝian instruadon en la lernejoj de diversaj landoj estas unu el la ĉefaj taskoj de nia movado ĝenerale kaj de niaj landaj asocioj speciale. Estas bedaŭrinda afero, ke ofte la landaj asocioj neglektas tion kaj tro malenergie starigas la aferon ĉe la aŭtoritatoj, kaj ĉe iaj eĉ tre etaj obstakloj, ĝenerale rezignas pri plua penado.

IX. EKSTERAJ RILATOJ

A. UNESKO

(1) **Konsultaj Rilatoj:** UEA plue konservas la konsultajn rilatojn en kategorio B. Pri la rilatoj kun Unesko, same kiel pri la aliaj eksteraj rilatoj de la Asocio, estas ŝarĝita la prezidanto. En Parizo mem, s-roj Jean Thierry kaj André Bourdeaux funkcias, laŭ la komisio de la prezidanto, kiel reprezentantoj de UEA ĉe la Sekretariato. La rilatoj kontentige evoluas. Bedaŭrinde, tro ofte nerajtigitaj kaj nekompetentaj personoj skribas rekte al la Sekretariato, kio nur kaŭzas malfacilaĵojn kaj kelkfoje postulas riparadon de malbono. Laŭ la peto de la Sekretariato UEA denove sendis al ĝi la Statuton de la Asocio en la angla kaj franca lingvoj. UEA invitis la Sekretariaton reprezentigi ĉe la 52-a UK, sed la Sekretariato povis sendi nur bondezirojn, ĉar ĝi ne plu reprezentigas ĉe kongresoj de NRO.

(2) **Programo:** UEA partoprenas en tiuj agadoj de la Programo de Unesko, kiujn ĝi eksplicite akceptis per sia letero de la 16-a de majo 1966.

(3) **Konferencoj:** S-ro Jean Thierry reprezentis la Asocion ĉe kunsidoj de diversaj laborgrupoj. Menciindaj estas la reprezentiĝo en la laborgrupo pri la Homaj Rajtoj dum la kunsidoj de junio kaj novembro 1967.

(4) **NRO:** UEA estas membro de la Konferenco de la Neregistaraj Organizaĵoj en Konsultaj Rilatoj en la kategorioj A kaj B, kaj partoprenis en ĉiuj renkontiĝoj organizitaj por la NRO. S-ro J. Thierry ĉeestis, kiel observanto, ankaŭ plurajn kunsidojn de la Konstanta Komitato de NRO. La planita libro pri NRO, kiun intencas publikigi la Konstanta Komitato, (vidu p-ton 4 de la Estrara raporto por 1966-1967), bedaŭrinde ankoraŭ ne estas eldonita. Per sia letero de la 3-a de novembro 1967 UEA faris plurajn energiajn rimarkojn rilate la enhavon de la libro.

(5) **Asociiĝintaj Junularaj Agadoj:** La 21-an de oktobro UEA sendis al la Sekretariato petskribon de TEJO por subvencio de 7.550 dolaroj por la projekto "Konsulta Centro pri la Lingva Problemo en Internaciaj Junularaj Organizaĵoj". En la nomo de TEJO la projekton ellaboris s-ro H. Bakker kaj abunde dokumentis ĝin. La Sekretariato ankoraŭ ne faris sian decidon (vidu ankaŭ ĉap. X).

(6) **Asociiĝintaj Lernejoj:** Pri tio okupiĝas la Konsulta Komisiono pri Lernejoj. Ĉi tie necesas nur menci, ke, sen efikaj kontaktoj de la landaj asocioj kaj landaj sekcioj de ISAE kun iliaj respektivaj Unesko-Komisionoj, tiu unika kanalo por vastigo de la instruado de Esperanto en la lernejoj ne povas esti utiligata.

(7) **Reciproka Studo kaj Aprezado de Kulturoj:** Kiel plia verko en la Serio "Oriento-Okcidento" aperis "La Spleno de Parizo" de Baudelaire en traduko de s-ro Lobut. La sekvanta verko en la Serio verŝajne estos "Korano".

(8) **Index Translationum:** La 7-an de decembro 1967 UEA sendis al la redakcio de tiu eldonaĵo la koncernan dokumenton de CED, aranĝitan konforme al la bezonoj de IT.

La Sekretariato de Unesko informis, ke necesas liveri la materialon por IT tra la naciaj centroj, kiuj okupiĝas pri tiu tasko. Sekve, UEA informis la respektivajn naciajn centrojn.

(9) **Unesko-Novajoj:** Aperis 5 pliaj numeroj de la Bulteno, tiel ke entute UEA ĝis nun publikigis 45 numerojn kun granda nombro da informoj. La Bulteno estas regule kaj senpage sendata al la redakcioj de la Esperanto-gazetoj kaj de la Esperantlingvaj elsendoj de radio-stacioj.

(10) **Unesko-Publikaĵoj en Esperanto:** La libreto "Oriento kaj Okcidento al Reciproka Kompreno" estas ankoraŭ aĉetebla por la prezo de 1,50 gld. de la C.O. Tiu verketo estas bonege utiligebla en diversaj okazoj.

(11) **CED-Dokumentoj:** La Sekretariato regule ricevas ilin en la angla.

(12) **Skandinavia Propono:** Vidu pri tio la Raporton por 1966-1967. La afero ankoraŭ ne estas solvita. UEA sekvas la evoluon.

B. UNUIĜINTAJ NACIOJ

(1) **Konsultaj Rilatoj:** Pro la Konsultaj Rilatoj kun Unesko UEA havas ankaŭ rilatojn kun la Ekonomia kaj Socia Konsilo de UN (t.n. "sur la listo"). Laŭ la komiso de la prezidanto, s-ro Mark Starr funkcias kiel loka reprezentanto de UEA ĉe la Sekretariato.

(2) **Propono al UN:** La 52-a UK "Tel-Aviv - Rotterdam" akceptis Rezolucion pri la afero. La kompleta teksto aperis en "Esperanto", septembro, 1967, p. 122. La tuta nederlanda gazetaro kaj pluraj eksterlandaj gazetoj raportis pri ĝi. UEA komunikis la tekston en la angla al la Ĝenerala Sekretario de UN per letero de la 9-a de aŭgusto 1967. Pro kaŭzoj, kiujn la prezidanto komunikos al la Komitato, UEA provizore ĉesigis la premon, ke UN rekonsideru sian pozicion, sed la afero plue troviĝas sur la tagordo. Necesas memori, ke en ĉiu okazo tiu grandega kampanjo per si mem prezentigas kiel pozitiva atingo por la afero de la Internacia Lingvo kaj povas esti vaste utiligata sur la kampo de informado.

(3) **Esperanto-Klubo:** En la koro mem de UN, en ĝia Sekretariato, troviĝas Esperanto-Klubo, kiu plue kontentige funkcias.

C. EŬROPA KAMPANJO

UEA decidis renovigi la klopodojn ĉe la Eŭropa Konsilantaro. Komence de 1968 la prezidanto konferencis pri la afero kun D-ro Herrmann kaj poste la Estraro decidis nomi D-ron Herrmann kiel komisiiton kaj subvencii lian laboron. Efektive, D-ro Herrmann tuj entreprenis la unuajn paŝojn, renovigis la reton de kunlaborantoj, verkis la unuajn dokumentojn, utiligante tiucele ankaŭ la materialojn de CED. Bedaŭrinde, la subita forpaso de D-ro W. Herrmann en marto 1968, provizore haltigis tiun laboron.

C. JARO DE HOMAJ RAJTOJ

Pro la fakto, ke pri tiu monda kampanjo okupiĝas kaj UN kaj Unesko, tiu ĉi ero de la Raporto aperas kiel aparta subĉapitro. Aldone al la p-to IX/A/5 de la pasintjara Raporto necesas diri, ke jam ekde 1965 UEA aktive partoprenas en la realigo de la antaŭpreparoj kaj programo de la JHR. D-ro P. Zlatnar reprezentis UEA en la Seminario de UN pri Multnaciaj Socioj, okazinta en Beograd de la 8-22 junio 1965. Ĉiuj delegitoj ricevis diversajn dokumentojn de CED, konformajn al la celo de la Seminario. La Asocio partoprenis en ĉiuj kunsidoj de NRO, okazintaj ĉu en la Sekretariato de Unesko, ĉu aliloke. La 22-an de junio 1967 UEA proponis al la prezidanto de la Internacia Komitato de NRO por la JHR apartan punkton por la Konferenco de NRO, kiu estis okazonta, kaj poste fakte okazis, en Ĝenevo komence de januaro 1968. La proponita punkto estas: "La Lingva Diskriminacio sur la Nacia kaj Internacia Niveloj" (art. 2 de la Universala Deklaracio). La Raporto pri la Konferenco de NRO okazinta en Ĝenevo de la 29-a ĝis 31-a de januaro 1968 mencias la partoprenon de UEA. La Laborplano de la Asocio estas kontentige realigata. Fine de novembro UEA publikigis la duan eldonon de la UD, kaj komence de 1968 la trian eldonon, kiu nun estas vaste distribuata. Krome, ĝi eldonis elegantan kaj modernan glumarkon kun la emblemo de la JHR kaj jena teksto: "Por la Internacia Lingvo — Kontraŭ Lingva Diskriminacio — Jaro de Homaj Rajtoj". Artikoloj regule aperas en la periodaĵoj de UEA kaj en organoj de la landaj

asocioj. CED realigas sian parton de la Programo. La aliaj eroj de la plano estos efektivigitaj dum la UK en Madrid. En marto UEA sendis al la Sekretariatoj de UN kaj Unesko, laŭ ilia peto, kvaronjaran raporton pri la progresado de la laboro sur tiu ĉi kampo. Informo pri la agado de UEA aperos en la n-ro 4 de la publikaĵo "Newsletter" de UN, kiu speciale traktas la agadojn okaze de la JHR.

D. ALIAJ RILATOJ

La kutimaj rilatoj kun Unio de Internaciaj Asocioj kaj ĉiuj NRO en konsultaj rilatoj kun Unesko evoluas normale. TEJO havas bonajn rilatojn kun nombro da junularaj organizaĵoj. En la revuo de UIA "Associations" regule aperas informoj pri la UK kaj diversaj internaciaj konferencoj aŭ renkontiĝoj, kiuj uzas Esperanton. En februaro UEA atentigis per aparta cirkulero ĉiujn internaciajn fakajn kaj specialigitajn Esperanto-organizaĵojn pri la "Jarlibro de Internaciaj Organizaĵoj", kiun eldonas UIA, kaj rekomendis al ili sendi la necesajn informojn, por ke ĉiuj internaciaj Esperanto-organizaĵoj aperu en la Jarlibro. Ĉi tie oni povas nur ripeti tiun rekomendon. La menciita Jarlibro estas konsultata de ĉiuj organizaĵoj kaj miloj da personoj tra la mondo.

X. JUNULARO

(1) **Landaj Sekcioj:** La nombro de Landaj Sekcioj restis konstanta dum 1967. Pluraj landoj troviĝas ĉe la sojlo de aliĝo al TEJO, interalie Brazilo, Meksiko, Kolombio kaj Ĉeĥoslovakio. Multaj sekcioj organizis internaciajn kaj naciajn renkontiĝojn, seminariojn, kaj kunsidojn; kelkaj eldonadis bultenojn (i.a. la brita, sveda, argentina, novzelandaj); aliaj intense laboris en la fako de publikaj rilatoj (i.a. la usona kaj germana); aliaj daŭrigis aŭ starigis tute specialajn agadojn, ekzemple eldonadon (Germanujo, Usono), organizadon de festivaloj (Hungarujo, Bulgarujo), aŭ studentan agadon (Pollando). La pola evoluigis ampleksan programon de labortendaroj.

(2) **Kongreso kaj renkontiĝoj:** La 23-a IJK de TEJO ne povis okazi en Natanja (Israelo) pro la milito. Anstataŭe ĝi okazis en la kadro de la Universala Kongreso en

Rotterdam, kun naŭdeko da partoprenantoj. Tamen en Israelo renkontiĝis pluraj gejunuloj en Natanja sub aŭspicio de TEJO. Tre nekompleta statistiko de la Turisma Servo de TEJO montris ke 2700 gejunuloj partoprenis 22 aranĝojn por junaj esperantistoj dum 1967. Jam antaŭ la fino de 1967, 24 eventoj estis anoncitaj por 1968. Por iel regi la nombron kaj eviti nenecesajn koincidojn, TEJO decidis starigi sistemon de aŭspicioj por la plej elstaraj aranĝoj. La unua tia evento estis la Renkontiĝo de Eŭropa Esperantista Junularo (Montecatini, Italujo, aprilo).

(3) **Komitato kaj Estraro:** En Rotterdam du novaj komitatanoj B estis elektitaj: f-ino Edvige Tantin (Italujo) kaj Robert Lloancy (Francujo). Anatol Gončarov (Sovetunio) estis reelektita. La nuna estraro havas jenan konsiston: Ivo Osibov (prezidanto), Humphrey Tonkin (ĝenerala sekretario), Ulrich Lins kaj Roman Dobrzyński (vicprezidantoj), Wouter Pilger (kasisto), Hans Bakker, Senad Čolić kaj Petr Todorov. Novaj anoj estas Čolić kaj Todorov. Pilger unue elektiĝis en speciala kromelekto frue en 1967.

(4) **Eldonaĵoj:** Post dujara servado, Stefan Maul retiriĝis kiel redaktoro de "Kontakto". Lia posteulo estas Roman Dobrzyński (Pollando), ankaŭ profesia ĵurnalisto. Dum la jaro oni komencis eldoni la revuon per alia presmetodo, ĉe alia presisto. La teknikaj kaj administraj malfacilaĵoj kunlige kun tio kaŭzis konsiderindajn prokrastojn, sed la jarkolekto 1967 estis kompletigita frue en 1968, kaj la revuo nun denove aperas regule, kun same alta kvalito de prezentiĝo kaj enhavo. Hans Bakker daŭrigis sian valoran laboron kiel redaktoro de "La Juna Vivo", la paĝo de TEJO en la revuo "Esperanto", kaj oni ankaŭ eldonis la internan sekretarian bultenon "InformFolio" dumonate. Ek de 1968 aperas la t.n. "Novaĵoj", novaĵ-bulteno pri TEJO kaj la junulara Esperanto-movado por la Esperanto-gazetaro kaj TEJO-aktivuloj. La angla-lingva kaj franclingva bulteno de TEJO ankaŭ aperis regule.

(5) **Rilatoj kun UEA:** Bonaj rilatoj daŭris dum la tuta jaro, konforme al la nature proksimaj kontaktoj inter junulara sekcio kaj ĝia gepatra organizo. Ulrich Lins

reprezentis la Organizon ĉe la Estraro de UEA. UEA daŭrigis sian subtenon de TEJO.

(6) **Laboro de la Estraro:**

a. Ivo Osibov denove respondecis pri kongresoj, eksterordinare komplika tasko dum 1967, pro la neceso lastmomente ŝanĝi la kongreslokon.

b. La transigon de "Kontakto" al nova presisto, kaj la rezultajn administrajn problemojn solvis Ulrich Lins kaj Wouter Pilger. Pilger, ĉefa arkitekto de la ŝanĝoj, ankaŭ rilatis kun la presisto, kaj helpis enkonduki Roman Dobrzyński en la redaktan laboron.

c. La nova aranĝo rilate al "Kontakto" permesis al Pilger draste redukti la deficiton de la Organizo, tiel ke ĝi estas nun survoje al kompleta financa stabiliĝo.

ĉ. Laboron en la fako Edukado de Gvidantoj kronis pluraj aranĝoj de esence "gvidseminaria" karaktero. En julio 1967 okazis tre sukcesa internacia seminario en Ĉeĥoslovakio, sub aŭspicio de TEJO. La Turisma Servo organizis seminarion "Esperanto en turismo" en Pollando en aŭgusto, seminario de TEJO okazis en la kadro de la Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo en decembro. En aprilo 1968 seminario organizita kunlabore kun la NEJO-komisiono okazis en Montecatini (Italujo). Ĉi-lastaj inkluzivis partoprenon de neesperantistaj junularaj funkciuloj, cele al interŝanĝo de spertoj kaj administraj plispertiĝo. Krome, okazis pluraj seminarioj je nacia nivelo. La fakon gvidis la ĝenerala sekretario ĝis 1968, kiam komencis ĝin transpreni Svobodan Zlatnar (Jugoslavio).

d. Konsiderinde plifortiĝis amikaj rilatoj kun aliaj junularaj Esperanto-organizoj. Interkonsento kun SAT-Junul-fako estis starigita, kaj oni komencis aktivajn kontaktojn kun IFEF-junularo. TEJO helpas SEL per informado pri la ĉi-somera Internacia Jamboreo, en kiu oni uzos Esperanton. La rilatoj kun STELO estis bonaj dank' al la Studenta Komisiono kiu nun kunordigas la laboron de TEJO, STELO kaj ISAE. Studentan agadon gvidis Senad Čolić.

e. Ĉolić ankaŭ respondecis pri regiona agado. Kunlabore kun Humphrey Tonkin li sukcesis plifortigi la agadon en diversaj mondopartoj kaj starigi pli proksimajn rilatojn kun tieaj aktivuloj.

f. La komisiono pri neesperantistaj junularaj organizoj (NEJO-komisiono) daŭrigis sian malfacilan laboron, per ampleksa programo de kontaktado kun NEJO-j, interŝanĝo de eldonaĵoj, kaj evoluigo de apartaj projektoj. La programon de Esperanto-kursoj ĉe volontulaj tendaroj oni plivastigis tiel ke ĉi-somere okazos kvin kursoj en Francujo kaj unu en Nederlando. Respondecas pri tiu ĉi programo Jeanne-Marie Liouville. Unu grava flanka rezulto de la programo estas esplorado pri testado kaj edukaj metodoj en Esperanto. Siavice tiu laboro enteniĝas en la nun jure establita Centro pri la Lingvo Problemo en Internaciaj Junularaj Rilatoj, kies ĉefa gvidanto estas Hans Bakker. La centro jam komencis ampleksan programon de sciencaj studoj kunlabore kun universitataj fakuloj, kaj nun serĉas financan subtenon por tiu gravega laboro.

(7) **Laboro ekster la Estraro:** Tonkin kaj Lloancy iniciatis programon por pligrandigi la nombron de aktivaj kunlaborantoj en TEJO, precipe per asigno al ĉiu komitatano de difinitaj taskoj. La rezultoj estis tre kuraĝigaj. Andrzej Grzebowski direktas la agadon de la Turisma Servo, kiu kunordigas turisman agadon kaj mem respondecis pri la Internacia Turisma Kunveno de la Esperanto-Junularo, kiu okazis en aŭgusto en Pollando. Ruben Feldman organizas Programon Pasporto, kiu nun atingas sian duan stadion — internacian interŝanĝon de gejunuloj por ĉefamilia restado, cele al pli granda reciproka kompreno.

(8) **Resumo kaj Perspektivo:** La jaron ĉefe karakterizis organiza plifirmiĝo. Kontaktoj inter la landaj sekcioj kaj TEJO mem estas nun konsiderinde pli proksimaj, kaj la nombro de kunlaborantoj pli granda. La landaj sekcioj en pluraj landoj intensigas sian agadon, kaj TEJO mem ekspansias, ĝi kongresos ĉi-somere en Tarragona, Hispanujo, kaj ellaboros planojn kiuj verŝajne inkluzivos gvid-seminariojn, NEJO-agadon, lernejan agadon, varbkampanjon kaj regionan agadon.

XI. INSTITUTO POR ESPERANTO EN KOMERCO KAJ INDUSTRIO

La Instituto por Esperanto en Komercio kaj Industrio provizore nur okupiĝas pri la kompilado de la speciala fakterminaro. Ĉiuj aliaj laboroj tial devis esti prokrastitaj.

XII. SPECIALAJ KULTURAJ AGADOJ

(1) **I.S.U.:** La 20-a Sesio okazis en Rotterdam (2-9 aŭgusto 1967). D-ro P. Neergaard estis la rektoro. Prelegis: Prof. Ing. O. Pancer, Prof. D-ro I. Lapenna, Prof. J. Régulo Pérez, D-ro A. Albault, Prof. Clelia Conterno kaj Doc. J. C. Wells. Detala raporto en la septembra "Esperanto", p. 124. Menciinde: en 20 jaroj entute prelegis 68 profesoroj kaj aliaj kvalifikitoj el dudeko da landoj. I.S.U. plenumis kaj plue plenumas tre gravan taskon: ĝi ne nur kontribuas al popularigo de la atingoj en diversaj branĉoj de la scienco, sed ankaŭ riĉigas la lingvon per novaj sciencaj terminoj. Sekretario: D-ro V. Sadler.

(2) **I.E.K.:** Ne okazis ŝanĝoj en la konsisto de la Internacia Ekzamena Komisiono. S-ro R. Hauptenthal estis ekzamenita parole en Würzburg. La parola ekzameno sukcesis. Nun lia tezo estas ekzamenata. Sekretario de IEK estas S-ro J. Wells de la Londona Universitato.

(3) **Belartaj Konkursoj:** Alvenis entute 84 konkursaĵoj de 33 aŭtoroj el 16 landoj. La unuajn premiojn en la unuopaj branĉoj ricevis: originala poezio: Wouter F. Pilger (Nederlando); tradukita poezio: Wouter F. Pilger; originala prozo: nealjuĝita; originala dramo: nealjuĝita; originala dramo: nealjuĝita; nova talento (pokalo "Harabaĝiu"): E. N. Mulders (Nederlando); foto-konkurso: nealjuĝita. La juĝkomisiono konsistis el s-ino C. Conterno-Guglielminetti, s-roj W. Auld, M. Lukaš, R. Bernard, J. H. Rosbach kaj A. Venture. La prezidanto estas Prof. G. Waringhien kaj la sekretario s-ino E. Lapenna. Detaloj en la septembra "Esperanto", p. 126.

(4) **Oratora Konkurso:** La unuan premion gajnis s-ro F. Simmonet (Francujo). La juĝkomisiono konsistis el s-roj G. Becker, D-ro H. Tonkin kaj R. Bernard. Detaloj en la septembra "Esperanto".

(5) **Teatro:** La Internacia Arta Teatro, kiu agas sub aŭspicio de UEA, prezentis dum la UK en Rotterdam plurajn verkojn: "Naiva Edzino" de Arkadij Averĉenko;; "Batalo ĉe Kazano", ŝerca sceneto de Branko Ĉopić; "Holanda Pupo", vodevilo de J. Baghy; "Taso da Kafo", monologo de Ivan Cankar; "La Leciono" de E. Ionesco. Reĝisoris S. Flego, la direktoro de I.A.T. Ludis la membroj de I.A.T. kaj kelkaj gastoj. La rusa aktoro N. Rytjkov deklamis. Detala raporto en la septembra "Esperanto", p. 125.

(6) **Koresponda Servo:** La nombro de slipoj denove kreskis en 1967. Entute nun estas en la Servo 2605 slipoj, el kiuj 2250 estas individuaj kaj 355 kolektivaj. Kelkmiloj da korespondpetoj estas peritaj. La financa situacio estas en ordo. La Koresponda Servo de UEA faras tre utilan laboron kaj helpas al internacia kompreniĝo per perado de internacia korespondado. La gvidanto de la Servo estas f-ino C. Hueter, 12, Rue des Jacobins, 63-Clermont-FD (PdD), Francujo.

(7) **Magnetofona Servo:** La nombro de haveblaj programoj kreskis de 207 al 236. La novaj eroj konsistas ĉefe el surbendigoj de la 51-a UK kaj de la studsemajno en Rinteln, Germanujo, en 1967. Detaloj pri la programoj troviĝas en la Jarlibro de UEA, 1967, p. 105. Malgraŭ la abundo de la surbendigitaj programoj, la lokaj societoj ne sufiĉe utiligas tiun ĉi servon. En 1967 estis ricevitaj nur 10 mendoj, kaj entute estis kopiitaj sole 37 horoj da programoj. Tamen, la financa situacio estas en ordo. La Estraro varme rekomendas precipe al la lokaj societoj riĉigi la programojn de siaj kunvenoj ankaŭ per magnetofonaj aranĝoj, utiligante tiucele tiun ĉi Servon. La komisiito estas s-ro Rüdiger Eichholz, 2427 Padstow Crescent, Clarkson, Ontario, Kanado.

(8) **Filma Servo:** Pri ĝi plue okupiĝas la komisiito s-ro Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, Göteborg, Vr., Svedujo.

(9) **Kontrolkomisiono pri Lernolibroj:** Ne estis ŝanĝo en la konsisto de la Komisiono. Kiel prezidanto funkcias D. B. Gregor, 34, Watersmeet, Northampton, Britujo. La Komisiono ricevis du petojn pri helpo. Al unu verko devis esti rifuzita la aprobo pro malemo de la aŭtoro konformiĝi al la rekomendo de la kontrolinto. De la alia oni scios la sorton en 1968. La tasko estas atingi absolute unuecan interpretadon de la Fundamento en diversaj nacilingvaj lernolibroj de Esperanto.

XIII. ĜENERALA TRARIGARDO

(1) **Aktoj de la Akademio 1963-1967:** Vera evento de la jaro estis la publikigo de Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto No. 9 kun titolo "Aktoj de la Akademio 1963-1967". Ĝi estas la unua presita eldonaĵo de la Akademio post multaj jaroj kaj enhavas gravajn dokumentojn, interalie pri la historio de lingvaj institucioj, vortfarado kaj participoj.

(2) **Literaturo:** Lastatempe, komprenante la gravecon de kontinueco en nia literaturo kaj lingva tradicio, oni dediĉis apartan atenton al la fotorepresado de malnovaj libroj. Elstaras antaŭ ĉio la epokfara verko de E. Drezen "Historio de la Mondolingvo" (1931), represita de Pirato, Oosaka. La sama eldonejo reaperigis "Ŝtato kaj Revolucio" de Lenin.

La plej fruaj beletraĵoj de la lingvo estas rehaveblaj dank' al la iniciato de Koko, Kopenhago. Temas pri "La Neĝa Blovado" (1888) "La Gefratoj" (1889) kaj "Janko-Muzikanto" (1891). La nova entrepreno de Artur E. Iltis ĵus reeldonis vortaron (germana-Esperanto) de Zamenhof el 1894 kaj antaŭvidas represon de la unua libro el 1887.

La rikolto sur la beletra kampo estis ne tre abunda. El Stafeto eliris nur 3 titoloj, tamen gravaj: originala novelaro "Okuloj" (M. Boulton) kaj du poemaroj "Fajro sur mia Lango" (E. de Kock) kaj "Vesperkanto" (H. Adamson). Unika en sia speco estas poemaro de V. Sadler "Memkritiko", kiu post la pseŭdonima enkondukas la anoniman modon.

El la traduka literaturo aparte reliefigas "Romeo, Julieta kaj la Tenebro" el la ĉeĥa kaj "Freŝa Mateno" el la hebrea.

Inter la politikaj eldonaĵoj precipe gravaj restis tiuj de Ĉinujo kaj Vjetnamujo, sed ankaŭ en GDR komencas aperi politikaj verkoj.

Sur la scienca kampo aparte grava estas la verko "Mondpercepto de la Modernaj Natursciencoj", kolekto de prelegoj el la 10-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo.

(3) **Revuoj kaj Gazetoj:** La nombro de periodaĵoj apenaŭ varias. Kiel nova faka periodaĵo estas menciinda "Internacia Jura Revuo" eldonata en Hungarujo. Ekeliris "Hinda Esperantisto" kaj reaperis post paŭzo "Tamen" kaj "Pola Esperantisto". Same por 1968 estas anoncita reapero de "Biblia Revuo". — Komenciĝis la preparlaboroj por "La Monda Lingvo-Problemo".

(4) **Bibliografio:** M. Ĝivoje eldonis novan bibliografion de internacilingvaj eldonaĵoj en Jugoslavio. Aperis katalogo de Hungarlanda Esperanto-Biblioteko (Szeged). Por apartaj fakaj bezonoj aperis perioda bibliografio interlingvistika "Fokuso" de E. Vilborg kaj elektobibliografio de H. Tonkin.

Aparte grava kaj bezona montriĝis bibliografio komentaria de R. Hauptenthal, felietone aperanta en la revuo "Esperanto" kaj nun presata ĉe L. Pickel en Nürnberg.

(5) **Diskoj:** Ĉiam pli ŝatataj fariĝas diversspecaj diskoj. Lastatempe aperis certa nombro, el kiuj pleje distingigatas "La Feliĉo" de Ramona van Dalsem kaj la longdaŭra disko "Jen nia Mondo". Krome aperis honore al J. Baghy recitaĵoj el liaj poemoj kaj en Japanujo serio "La Voĉalbumo de Esperanto".

(6) **Radio:** Aktualaj tabeloj daŭre aperas en "Esperanto" kaj en statistikoj de CED. (Vidu raporton de CED B 8).

(7) **Lernolibroj kaj vortaroj:** Aparte grava estis la longe atendata apero de lerniloj en GDR, kiuj eliris komence de 1968: vortaro Esperanto-germana kaj lernolibro.

Sur la vortara kampo okazis pluraj eventoj: epokfara estis la nova vortaro Esperanto-angla de M. C. Butler kaj kroatserba vortaro de M. Ĝivoje. Krome aperis hebrea

vortaro de Murĵan, jida de H. Fineman kaj hispana de E. Tudela-Flores.

Inter la novaj terminaroj oni notas la katolikan por japanoj kaj la teknikan de R. Haferkorn (germana-Esperanto).

Krom tio estis eldonitaj aro da diversaj lernolibroj i.a. por ĉeĥoj (A. Berka; T. Kilian), por italoj (G. Pacelli), mongoloj (Rinĉen) kaj serboj (G. Sredić).

(8) **Trafiko kaj Komerco:** Eldonaĵoj aperis interalie en Nederlando, Hispanujo kaj Hindujo. Ankaŭ multaj lokoj de Hungarujo daŭre aperigas prospektojn, faldfoliojn kaj gvidlibrojn. Aparta broŝuro aperis pri Mainz (Germanujo).

(9) **Akademio:** La oficiala komuniko de la Akademio de Esperanto pri la partecoj aperis en preskaŭ ĉiuj iom gravaj gazetoj. Per tiu decido la Akademio sekvis peton i.a. de la Komitato de UEA. La rekomendo de la Akademio kiel la sola aŭtoritata lingva institucio de la Esperantomovado certe estos observata de ĉiuj uzantoj de la lingvo.

XIV. KONKLUDO

La Estraraj Raportoj de la lastaj jaroj respegulas la grandajn streĉojn en la agadoj dediĉitaj al la datrevenoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj UNESKO, precipe koncerne la transdonon de la Propono al UN.

Ankaŭ la nuna raporto vidigas en kelkaj punktoj la klopodojn de la centraj organoj por prezenti en eksteraj medioj nian starpunkton rilate la lingvan problemon, speciale en ligo kun la Jaro de Turismo 1967 kaj la Jaro de la Homaj Rajtoj 1968.

Ĉiuj membroj de la Asocio devos streĉi siajn fortojn por helpi en la forigo de malfacilaĵoj, kiuj obstaklas ankoraŭ pli vastan aktivadon de la Asocio. La kampanjo por fortikigo de UEA okaze de la 60-jara datreveno de ĝia fondiĝo devas rezultigi konsiderindan kreskon de la membronombro, unuavice en la kategorio de Membro-Abonantoj. Tio ebligas al ĝi pli sukcese lukti: por la Internacia Lingvo — kontraŭ la lingva diskriminacio.

Prof. D-ro Ivo Lapenna
Prezidanto

Günther Becker
Ĝenerala Sekretario

RAPORTO PRI LA AGADO
de la
CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO
pri la
MONDA LINGVO-PROBLEMO
por la periodo de 1-IV-1967 ĝis 1-IV-1968

A. ORGANIZAJ DEMANDOJ

- (1) **Oficejo:** Ĝi plue troviĝas en 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Londono, sed ekde la fino de 1967 ankaŭ oficiale Rotterdam estas aldonita kiel la alia sidejo, ĉar tie troviĝas la redakcio de la nova revuo (vidu sube) kaj ankaŭ la tuta teknika laboro de multobligado kaj ekspe-
dado de la dokumentoj estas farata en la C.O. Tie jam troviĝas granda parto de la arkivo de CED.
- (2) **Kunlaborantoj:** Entute 87 en 23 landoj, kompare kun 85 en 22 landoj en la pasinta laborjaro. Pluraj kunlabo-
rantoj de la nova revuo ne estas enkalkulitaj.
- (3) **Kontaktoj:** La kontaktoj kun la kunlaborantoj realiĝas
aŭ per korespondado aŭ per cirkuleroj. Personaj renkon-
tiĝoj okazas dum la Universalaj Kongresoj aŭ en la
CED-oficejo, kelkfoje dum seminarioj kaj konferencoj.
- (4) **Nova Nomo:** Pro diversaj kaŭzoj, sed ĉefe por adapti
la nomon de CED al ĝiaj nuntempaj laboro kaj taskoj,
la Estraro de UEA decidis ŝanĝi la nomon de CED al:
"Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda
Lingvo-Problemo", sed ĝi plue estos ĝenerale konata
kiel CED.
- (5) **Financa Situacio:** La konto de CED aperas aparte en
la Financa raportaro de UEA. Ĉi tie estas utile atentigi,
ke, kune kun la negativa saldo de £ 9-12-2 el la antaŭa
jaro, la sumo de la elspezoj estis entute £ 798-18-11, do
iom malpli ol la buĝetita sumo de £ 800-0-0. La sumo de
donacoj estis entute £ 196-17-3 kompare kun £ 132-7-0
en la antaŭa jaro. La sumo de donacoj konsiderinde
transpasis la sumon de £ 100-0-0, antaŭviditan en la
buĝeto por 1967. S-ro E. F. Dean (Britujo) sola donacis

precize £ 100-0-0, nome pli ol la duonon, kaj CED ankaŭ
ĉi-maniere esprimas al li tute specialan dankon pro lia
granda helpo. Same tiel dankon al ĉiuj aliaj donacintoj.
Ekde la sekvanta jaro CED publikigos apartan konton
rilate la novan revuon. Ĉi tie sufiĉas diri, ke, dank' al
malavaraj kontribuoj de aro da amikoj de CED tra la
mondo, la baza kapitalo de 20.000 guldenoj estis kolektita
jam antaŭ la finiĝo de la Kongreso en Rotterdam. Pli ol
16.000 guldenoj jam alvenis kaj troviĝas en tute aparta
konto en banko en Rotterdam. La cetero certe alvenos
en tiu ĉi jaro, ĉar temas pri firmaj promesoj. Fine, por
lanĉi la novan revuon, la usona *Institute for International
Order* (Instituto por Internacia Ordo) decidis kontribui
la sumon de 1.000 dolaroj.

B. PLENUMITAJ LABOROJ

- (1) **Dokumenta Materialo.** Entute estas kolektitaj kaj kata-
logitaj 2.771 dokumentoj kaj, krome, entute ĉ. 4.700 eroj
el diversaj libroj, revuoj kaj gazetoj.
- (2) **CED-dokumentoj:** Estas eldonitaj 18 pliaj dokumentoj
en Esperanto kaj en la angla, tiel ke entute CED ĝis nun
eldonis 282 dokumentoj. Ĉ. 300 institucioj kaj individuaj
personoj ricevas la dokumentojn en la angla, kelkfoje en
aliaj lingvoj. La jarabono por la Esperantlingva versio
estas 5.50 gld. Tiujn dokumentojn povas aboni ĉiu espe-
rantisto. En la pasinta jaro estis entute 159 abonantoj.
- (3) **CED/7:** La dokumento "Bazaj Faktoj pri la Internacia
Lingvo (Esperanto)" aperis en Esperanto, angla, hispana,
pola, japana, nederlanda. En septembro aperis la dua
eldono de la angla traduko kiel Dok. RDC/7. Tiu ĉi eldono
estas presita, 12-paĝa en la kutima formato, kaj ĝisdatigita.
Ĝi estas vaste uzata en la angle parolantaj landoj. La
blindulbiblioteko "Le Sage ten Broek" preparas brajlan
eldonon de la nederlanda traduko. En Israelo estas
preparata la hebrea traduko.
- (4) **Diversaj aliaj tradukoj:** La unua ĉapitro de la verko
"La Internacia Lingvo", publikigita siatempe de CED sub
la redakto de ĝia direktoro, aperis en marto en itala
traduko kiel broŝuro. Tiu ĉi traduko estis eldonita en
Trento per financa helpo de la tiea komunumo. La
eldonnumero estas 4000. Itala Esperanto-Federacio intencas

distribui la verketon ĉefe en lernejoj. La eldonaĵoj aŭ dokumentoj de CED estas ofte utiligataj por verkado de prelegoj aŭ seriozaj artikoloj. Aparte menciinda estas la artikolo verkita de Prof. Inĝ. O. Pancer sub la titolo "La Internacia Lingvo kaj la Antaŭenigo de la Scienco" kaj publikigita en la gravega jugoslavia periodaĵo *Encyclopedia Moderna*". Tiu unuaranga artikolo estas grandparte bazita sur informoj ĉerpitaj el diversaj dokumentoj de CED.

(5) **Diroj de Famaj Personoj:** Mag. I. Dratwer, kunlaboranto de CED, kompletigis sian ampleksan manuskripton, kiu enhavas multajn eldirojn de konataj personoj sur diversaj kampoj de publika vivo. La verko unue aperos en stencilita formo kaj poste, se la financaj rimedoj permesos tion, en presita.

(6) **Homaj Rajtoj:** Okaze de la Jaro de la Homaj Rajtoj CED entreprenis apartan esplorklaboron, kiu rilatas al unuopaj artikoloj de la Universala Deklaracio en ligo kun la lingva demando. La ĉefaj aspektoj nun studataj de pluraj kunlaborantoj estas: internaciaj dokumentoj, kiu montras la universalecon de lingvaj rajtoj; lingva diskriminacio ĝenerale kaj lingva imperiismo en la mondo kaj en unuopaj landoj; oficialaj lingvoj en internaciaj organizaĵoj kaj naciaj parlamentoj; persekutoj kontraŭ Esperanto kaj Esperanto-organizaĵoj; lingva diskriminacio en edukado kun aparta konsidero de diskriminacio rilate al Esperanto. La rezultoj de tiu laboro estas parte publikigataj en la revuo "Esperanto", parte aperas kiel dokumentoj de CED, kaj parte estos publikigitaj en la revuo "La Monda Lingvo-Problemo".

(7) **La Monda Lingvo-Problemo:** La 10-an de decembro 1968 aperos la unua numero de la nova eldonaĵo de CED "La Monda Lingvo-Problemo". Tiu ĉi revuo, enhave altnivela kaj luksa laŭ la aspekto, aperados tri fojojn jare en formato de 23 x 17 cm, kaj ĉiu numero havos 64 paĝojn. La artikoloj estos verkitaj en naciaj lingvoj, laŭ la elekto de la aŭtoroj, kun ampleksaj resumoj en Esperanto. La artikoloj pritraktos diversajn aspektojn de la lingva problemo: lingvistika, sociologia, psikologia, ekonomia, jura, politika k.a. La preparlaboroj evoluas tre kontentige. Nombro da artikoloj de kompetentaj aŭtoroj jam troviĝas

ĉe la redakcio. Ĉefredaktoro estos D-ro V. Sadler. En la redakta komitato troviĝas: C. J. Adcock, ĉefo de la Departemento de Psikologio de la Universitato de Wellington; Géza Bárczi, profesoro de la hungara lingvo en la Universitato de Budapeŝto kaj Membro de la Hungara Akademio de Sciencoj; C. C. Berg, profesoro de aŭstroneziaj lingvoj en la Universitato de Leiden kaj Membro de la Nederlanda Akademio de Sciencoj; E. A. Bokarev, vicdirektoro de la Lingvistika Instituto de la Soveta Akademio de Sciencoj; Eugen Wüster, Direktoro de la Sekretariato de la Terminologia Komitato de la Internacia Organizaĵo por Normigo kaj Prezidanto de la Aŭstra Asocio por Dokumentado kaj Bibliografio; Zenon Klemensiewicz, Membro de la Pola Akademio de Sciencoj kaj Prezidanto de la Societo de Amikoj de la Pola Lingvo; Arthur Capell, Eksterordinara Profesoro de oceaniaj lingvoj en la Universitato de Sydney; Ivo Lapenna, Profesoro (nekatedra de Kompara Soveta kaj Orienteŭropa Juro en la Universitato de Londono, estinta Profesoro de Publika Internacia Juro en la Universitato de Zagreb; Bruno Migliorini, Profesoro de Historio de la Itala Lingvo en la Universitato de Firenze kaj Membro de la Nacia Akademio; Mario Pei, Profesoro de Romanida Filologio en la Universitato de New York (Columbia); Gaston Waringhien, Hon. Profesoro de la Franca Lingvo en la Brita Instituto de Parizo. Pro la graveco de tiu ĉi nova eldonaĵo CED dediĉis speciale multe da atento al la preparlaboroj.

(8) **Radio:** Laŭ la statistiko, ellaborita de s-ro G. Largentier, kunlaboranto de CED por la radio, la nombro de ĉiuj radio-elsendoj en 1967 estis 2014, kompare kun 2290 en 1966 kaj 1807 en 1965. La nombro de stacioj estis 20 en 13 landoj. Pliaj detaloj en "Esperanto" kaj en la Jarlibro.

(9) **Lernejoj:** La statistiko pri 1965/1966 aperis kiel dokumento B/IV/12 en julio 1967. Ĉar CED kutime faras enketojn pri tiu demando nur ĉiun duan aŭ trian jaron, nova enketo estas antaŭvidita por la sekvanta lerneja jaro.

(10) **Sciencistoj:** La enketo pri sciencistoj, kiu uzas aŭ komprenas Esperanton, plue progresas. Pri ĝi okupiĝas la kunlaboranto de CED D-ro W. de Smet.

(11) **Universitatoj:** Prof. J. Régulo Pérez, kiu transprenis la taskon enketi pri la universitatoj, en kiuj la lingvo estas instruata, bedaŭrinde ne povis fini sian laboron pro malsaniĝo kaj pluraj aliaj malfacilaĵoj.

(12) **Index Translationum:** D-ro V. Sadler ellaboris dokumenton konforme al la postuloj de IT. Ĝi aperis kiel Dok. D/II/15 kaj estis sendita al la redaktoro de IT la 14-an de novembro 1967.

(13) **Nobel-Premio:** Ankaŭ en la pasinta jaro CED helpis per dokumentado de proponoj ke UEA ricevu la Nobel-Pacpremion.

(14) **Ekonomiaj malavantaĝoj de multlingveco:** La kolektado de dokumentoj estas daŭrigata. Pluraj estas jam prilaboritaj. Mallongaj informoj aperis en pluraj numeroj de "Esperanto" en la rubriko de CED. Pli ampleksaj studoj aperos en "La Monda Lingvo-Problemo".

(15) **Fakvortaroj:** Aperis nombro da novaj fakterminaroj. La materialo troviĝas ĉefe en Rotterdam. Pro la kvanto de aliaj taskoj, precipe en ligo kun la nova revuo, ankoraŭ ne povis aperi ĝisdata dokumento pri ĉiuj fakaj vortaroj kaj terminaroj en Esperanto.

(16) **Esperanto-societoj:** La kompleta listo de ĉiuj lokaj Esperanto-societoj laŭ la stato en 1965 estas ankoraŭ havebla de la C.O. de UEA. CED varme rekomendas al la lokaj grupoj mendi tiun liston, kiu faciligas internaciajn kontaktojn de la lokaj Esperanto-organizaĵoj.

(17) **Bibliografio:** Laboro daŭrigata.

(18) **Stratoj:** Kolektado de informoj pri stratoj aŭ placoj kun la nomoj "Esperanto" aŭ D-ro Zamenhof estas daŭrigata.

(19) **Tradukmaŝinoj:** CED plue sekvas la evoluon. Artikoloj pri tio aperos en la nova revuo.

C. LABORPLANO POR 1968-1969

(1) **Kunlaborantoj:** Altiri kelkajn pliajn specialistojn al la ĝenerala laboro de CED, precipe kunlaborantojn de la nova revuo.

(2) **Dokumenta materialo:** Daŭrigi la kolektadon laŭ la ĝisnuna sistemo.

(3) **Dokumentoj:** Eldoni ĉ. 20 dokumentojn laŭ la ĝisnuna sistemo, kun aparta konsidero al demandoj ligitaj al Homaj Rajtoj.

(4) **Homaj Rajtoj:** Pluaj esploroj pri la lingva diskriminacio kaj publikigo de la ĉefaj rezultoj aŭ en formo de dokumentoj aŭ en la nova revuo.

(5) **Ekonomiaj malavantaĝoj de multlingveco:** Daŭrigi la kolektadon de dokumentaj materialoj kaj publikigi la ĉefajn rezultojn de studoj en la nova revuo.

(6) **Tradukmaŝinoj:** Plue sekvi la evoluon.

(7) **La Monda Lingvo-Problemo:** Komenci publikigadi la novan revuon LMLP la 10-an de decembro 1968 (vidu B/7).

(8) **Enciklopedio de Esperanto:** Doni helpon en la redaktado de la dua eldono (ĉefredaktoro U. Lins, redaktoro R. Hauptenthal). La preparado de la manuskripto postulos laboron de pluraj jaroj. La verko estos publikigita de Stafeto sub aŭspicio de CED.

(9) **Bibliografio:** Kompletigi kaj ĝisdatigi.

(10) **Index Translationum:** Livero de prespreta materialo al Unesko.

(11) **Radio:** Statistiko pri la elsendoj en 1968.

(12) **Stratoj:** Kompletigo de la listo.

(13) **Lernejoj:** Se eble, nova enketo por la lerneja jaro 1968/1969.

(14) **Universitatoj:** Enketo pri katedroj kaj lektoratoj.

(15) **Sciencistoj:** Daŭrigo de la enketo pri sciencistoj, kiuj uzas Esperanton.

(16) **Diroj de famaj personoj:** Eldono de la verko de Mag. Dratwer.

(17) **Faktoj pri Esperanto:** Se iel eble, publikigi reviziitan kaj kompletigitan eldonon.

(18) **Aliaj taskoj:** Laŭbezzone plenumo de aliaj taskoj.

Prof. D-ro Ivo Lapenna
Direktoro de CED

ĈEFAJ KOREKTOJ POR LA JARLIBRO 1968,

UNUA PARTO

paĝo

- 30 La **dana** informa fako estas nun ĉe: Johs. Bjerg Nielsen, Dr. Margrethesvej 33, DK 4000 Roskilde.
- 70 Ĉiujn informojn pri **denaskaj esperantistoj** oni bonvolu direkti estonte al la Centra Oficejo.
- 72 **IFEF** havas novan Estraron, kies sekretariino estas: S-ino Elfriede Kruse, Schweizer Str. 104, D-6 Frankfurt 70, Germanujo.
- 81 Aldoniĝas: Internacia **Turisma** Esperanto-Asocio, ĉe s-ro M. Jaumotte, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.
- 84 Aldoniĝas: Universala **Invalida** Esperanto-Asocio, Box 5, DK 5594 Strib, Danlando.
- 109 Ne plu aperas **La ĝusta vojo**.
- 110 La revuon **La internacia fervojisto** redaktas nun s-ro Per J. Krogstie, Løten, Norvegujo.
- 111 Ne plu aperas **Kajero**.
- 487 Forstreku: **Libroservo de KUNE**.
- 488 Forstreku: **Wüster**.



ENHAVO

Antaŭparolo	3
Rezolucio	5
Komitato de U.E.A.	6
La Esperanta Flago	9
Estraro de U.E.A.	10
Honora Patrona Komitato	11
Centra Oficejo	12
C.E.D.	14
U.E.A.-kotizoj	16
Financoj	22
Raporto de la Estraro	
I Enkonduko	29
II Ĝeneralaĵoj	29
III Administrado	31
IV Financoj	33
V Periodaĵoj	36
VI Kongresoj	37
VII Informado	39
VIII Lernejoj	41
IX Eksteraj Rilatoj	43
X Junularo	47
XI Inst. por Esp. en Komerco kaj Industrio	51
XII Specialaj Kulturaj Agadoj	51
XIII Ĝenerala Trarigardo	53
XIV Konkludo	55
Raporto de C.E.D.	56
Korektoj Jarlibro I, 1968	62
	63

UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

- U.E.A. eldonas la monatan revuon "Esperanto"
- U.E.A. eldonas la monatan revuon "La Praktiko"
- U.E.A. eldonas Jarlibron en du partoj
- U.E.A. havas vastan delegitan reton
- U.E.A. organizas la Universalajn Kongresojn
- U.E.A. kreis la Centron de Esploro kaj Dokumentado
- U.E.A. ebligis la reprezentigon en Montevideo kaj Nov-Jorko
- U.E.A. iniciatis la Internacian Someran Universitaton
- U.E.A. organizas la Belartajn Konkursojn
- U.E.A. aranĝis la Universalan Ekspozicion
- U.E.A. funkciigas Internacian Gazetaran Servon
- U.E.A. funkciigas Eldonan Fakon
- U.E.A. aŭspicias la Internacian Artan Teatron
- U.E.A. havas Filman Servon
- U.E.A. havas Korespondan Servon
- U.E.A. havas Magnetofonan Servon

CIO CI MERITAS VIAN SUBTENON

Tial: Aligu viajn amikojn al U.E.A.

Membro kun jarlibro kaj revuo: 25,— gid., 100 steloj

Membro kun jarlibro: 12,50 gid., 50 steloj

Centra Oficejo de U.E.A.

Nieuwe Binnenweg 176 — Rotterdam — Nederlando

